

eLIBRO

Marx & Engels


Manifiesto
de la
Komunista
partio

I N K O

Karl Marx kaj Friedrich Engels
MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO
Esperanta traduko kaj postparolo
de Detlev Blanke

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin



Presita versio de ĉi tiu elektronika libro, abunde ilustrita, aperis ĉe Progreso Eldonejo, Moskvo 1990, kaj estas aĉetebla ĉe diversaj libroservoj, ekzemple ĉe la Libro servo de UEA.
(ISBN 5-01-002341-5)

ISBN 91-7303-142-9

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

FEBRUARO 2002

Antaŭparolo al la germana eldono de 1872

La Ligo de Komunistoj, internacia asocio de laboristoj, kiu sub la tiamaj kondiĉoj kompreneble povis esti nur sekreta, komisiis dum la kongreso, okazigita en novembro 1847 en Londono, la subskribintojn verki detalan teorion kaj praktikan parti-programon destinitan por la publiko. Tiel ekestis la sekva "Manifesto", kies manuskripto migris kelkajn semajnojn antaŭ la Februara Revolucio¹ por preso al Londono. Unue publikigita germane, en tiu lingvo ĝi estis presita en Germanio, Anglio kaj Usono en almenaŭ dek du diversaj eldonoj. La angla teksto unue aperis en la jaro 1850 en Londono en "Red Republican", tradukita de Miss Helen Macfarlane (Mekfarlejn), kaj krome en 1871 aperis almenaŭ en tri diversaj tradukoj en Usono. La franca teksto unue aperis mallonge antaŭ la Junia Insurekcio 1848² en Parizo, lastatempe en "Le Socialiste" en Nov-Jorko. Novan tradukon oni preparas. Pola versio aperis mallonge post la unua germana eldono. Rusa versio aperis en Ĝenevo dum la sesdekaj jaroj. Ankaŭ en la danan ĝi estis tradukita baldaŭ post sia apero.

Kiom ajn ŝanĝiĝis la cirkonstancoj dum la lastaj dudek kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj, evoluigitaj en ĉi tiu "Manifesto" entute restas plene validaj ankaŭ hodiaŭ. Jen kaj jen oni

1 La franca revolucio dum februaro 1848. (Trad.)

2 Ribelo de la pariza proletaro de la 23-a ĝis la 26-a de junio 1848, kiu markis la kulminon de la revolucio 1848 – 1849 en Eŭropo. (Trad.)

Manifest

der

Kommunistischen Partei.

Veröffentlicht im Februar 1848.

Proletarier aller Länder vereinigt Euch!

London.

Gedruckt in der Office der „Bildungs-Gesellschaft für Arbeiter“
von J. C. Burghard.

46, LIVERPOOL STREET, BISHOPSGATE.

devus plibonigi detalojn. Kiel la "Manifesto" mem klarigas, la praktika apliko de tiuj principoj ĉie kaj ĉiam dependos de la ekzistantaj historiaj kondiĉoj. Pro tio ankaŭ ne estas metita aparta akcento sur la revoluciajn intervenojn, proponitajn fine de la ĉapitro II. Tiu parto hodiaŭ aspektus multrilate alia. Rigarde al la grandega evoluo de la grandindustrio dum la lastaj dudek kvin jaroj kaj la progresinta partia organiziĝo de la laborista klaso, ligita al ĝi, rigarde al la praktikaj spertoj kolektitaj unue dum la Februara Revolucio kaj eĉ multe pli dum la Pariza Komunumo³, kie unuan fojon la proletaro dum du monatoj havis la politikan potencon, rigarde al tio ĉi tiu programo hodiaŭ kelkloke estas malnoviĝinta. La Komunumo aparte pruvis, ke "la laborista klaso ne simple povas preni en posedon la pretan ŝtatemekanismon kaj ekfunkciigi ĝin por siaj propraj celoj". (Vidu "Der Bürgerkrieg in Frankreich. Adresse des Generalraths der Internationalen Arbeiter-Association")⁴, germana eldono, p. 19, kie la temo estas plutraktita). Plue kompreneblas, ke la kritiko pri la socialisma literaturo hodiaŭ estas mankhava, ĉar ĝi nur traktas ĝis 1847; la samo koncernas la rimarkojn pri la rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (ĉapitro IV), kvankam ili nuntempe ankoraŭ estas ĝustaj en la bazaj trajtoj, tamen laŭ sia prezento ili hodiaŭ estas malnoviĝintaj jam pro tio, ĉar la politika situacio totale transformiĝis kaj la historia evoluo elmondigis la plej multajn de la tie menciitaj partioj.

3 Revolucia registaro de la laboristaro, kreita per proleta revolucio la 18-an de marto 1871 en Parizo. La Pariza Komunumo estis la unua provo fari proletan revolucion kaj starigi la diktaturon de la proletaro. Ĝi ekzistis ĝis la 28-a de marto 1871. (Trad.)

4 "La civitana milito en Francio. Mesaĝo al la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio". (Trad.)

Tamen, la "Manifesto" estas historia dokumento, kiun ni ne plu rajtigas nin ŝanĝi. Pli posta eldono eble aperos kun enkonduko, kiu kovros la tempospacon de 1847 ĝis nun. La prezentata represo por ni venis tro neatendite, por lasi al ni la tempon por tia enkonduko.

Londono, la 24-a de junio 1872

Karl Marx, Friedrich Engels

Antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882⁵

La unua rusa eldono de la "Manifesto de la Komunista Partio", tradukita de Bakunin, aperis komence de la sesdekaj jaroj⁶ en la presejo de "Kolokol"⁷. La Okcidento en ĝi (la rusa eldono de la "Manifesto") tiam nur povis vidi literaturan kuriozaĵon. Tia opinio hodiaŭ estus neebla.

Kiam limigitan kampon la proleta movado ankoraŭ havis tiam (decembro 1847), plej klare montras la fina ĉapitro de la "Manifesto": "La rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj" en la diversaj landoj. Tie mankas ĝuste Ruslando kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Estis la tempo, kiam Ruslando estis la lasta granda rezervujo de la tuta eŭropa reakcio; kiam la Unuiĝintaj Ŝtatoj absorbis la superfluan proletaran forton de Eŭropo per enmigrado. Ambaŭ landoj provizis Eŭropon per krudmaterialoj kaj samtempe estis merkatoj por la vendo de ĝiaj industriaĵoj. Do tiam ambaŭ landoj tiel aŭ aliel estis kolonoj de la ekzistanta eŭropa ordo.

Kiom malsame estas hodiaŭ! Ĝuste la eleŭropa enmigrado

- 5 Ĉi tiu antaŭparolo al la dua rusa eldono de la "Manifesto" estas komune verkita de Marx kaj Engels. (*Trad.*)
- 6 La unua rusa traduko de la "Manifesto" aperis en 1869 en Ĝenevo, en la eldonejo "Volnaja russkaja tipografija". (*Trad.*)
- 7 La rusa ĵurnalo "Kolokol" (sonorilo) havis demokratian kaj revolucionan tendencon kaj estis eldonita de 1857 ĝis 1867 de la demokrataj revoluciuloj Aleksandr Herzen (1812 – 1870) kaj Nikolaj Ogarjov (1813 – 1877). (*Trad.*)

ebligas al Norda Ameriko gigantan agrokulturan produktadon, kies konkurenco ekskuas la fundamentojn de la eŭropa terproprietato, ĉu granda, ĉu malgranda. Krome, tio permesas al la Unuiĝintaj Ŝtatoj ekspluati siajn grandegajn industriajn fontojn per tiom da energio kaj en tia skalo, ke post malmulta tempo ili devas rompi la ĝisnunan industrimonopolon de okcidenta Eŭropo, aparte tiun de Anglio. Ambaŭ cirkonstancoj reefikas revoluciige al Ameriko mem. La malgranda kaj meza terproprietatoj de la farmantoj, la bazo de la tuta politika konstitucio, iom post iom estas venkitaj de la konkurenco de la grandaj farmbieno. En la industriaj distriktoj samtempe unuan fojon disvolviĝadas amasa proletaro kaj okazas neimagebla koncentriĝo de kapitaloj.

Kaj nun Ruslando! Dum la revolucio de 1848/49 ne nur la eŭropaj princoj sed ankaŭ la eŭropaj burĝoj vidis en la rusa enmiksiĝo la solan savon kontraŭ la ĵus vekiginta proletaro. La caro estis proklamita ĉefo de la eŭropa reakcio. Hodiaŭ li estas militkaptito de la revolucio en Gatĉina⁸, kaj Ruslando formas la avangardon de la revolucia agado en Eŭropo.

La "Komunista Manifesto" havis la taskon proklami la neeviteble antaŭstarantan dissolviĝon de la moderna burĝa proprietato. Sed en Rusio ni trovas, krom rapide ekfloranta kapitalisma trompo kaj nur ĵus evoluanta burĝa terproprietato, la duonon de la tero kiel komunan proprietaton de la kamparanoj. Ekestas la demando: Ĉu la rusa *obŝĉina*, formo de la malnova komuna proprietato je tero, kvankam forte subfo-

8 Post la mortigo de la caro Aleksandro la Dua fare de membroj de la sekreta organizaĵo "Narodniki" (popolamikoj) dum marto 1881, la posteulo Aleksandro la Tria kaŝiĝis en la Kastelo Gatĉina proksime de Sankt-Peterburgo. (*Trad.*)

sita, povos senpere transiri al la pli alta formo de komunisma komuna proprieto? Aŭ, ĉu inverse, ĝi devas antaŭe trairi la saman procezon de dissolviĝo, kiu karakterizas la historian evoluon de la Okcidento?

La hodiaŭ sole ebla respondo pri tio estas: Se la rusa revolucio fariĝos la signalo de proleta revolucio en la Okcidento, tiel, ke unu kompletigas la alian, tiam la nuna rusa komuna proprieto je tero povas servi kiel elirpunkto de komunisma evoluo.

Londono, la 21-a de januaro 1882

Karl Marx, Friedrich Engels

Antaŭparolo al la germana eldono de 1883

La antaŭparolon al la prezentata eldono mi bedaŭrinde devas subskribi sole. Marx, la homo, al kiu la tuta laborista klaso de Eŭropo kaj Ameriko dankas pli multe ol al iu ajn alia — Marx ripozas en la tombejo de Highgate⁹, kaj super lia tombo jam kreskas la unua herbo. Depost lia morto entute ne plu povas temi pri prilaboro aŭ kompletigo de la "Manifesto". Des pli necesas laŭ mi esprimi ĉi tie ankoraŭfoje jenon.

La baza penso trairanta la tutan "Manifeston": ke la ekonomia produktado kaj la socia strukturiĝo de ĉiu historia epoko, necese sekvanta el tiu produktado, formas la fundamenton por la politika kaj intelekta historio de tiu epoko; ke sekve (ekde la dissolviĝo de la praa komuna terproprietio) la tuta historio estis historio de klasbataloj, bataloj inter ekspluatataj kaj ekspluatantaj, regataj kaj regantaj klasoj sur diversaj ŝtupoj de la historia evoluo; sed ke tiu batalo nun atingis ŝtupon, kie la ekspluatata kaj subpremanta klaso (la proletaro) ne plu povas liberigi sin de la klaso (burĝaro) ekspluatanta kaj subpremanta ĝin, sen samtempe liberigi la tutan socion por ĉiam de ekspluatado, subpremado kaj klasbataloj — tiu fundamenta penso sole kaj ekskluzive apartenas al Marx¹⁰.

9 Karl Marx mortis la 14-an de marto 1883 kaj estis entombigita en la tombejo Highgate (Hajgit) en Londono. (*Trad.*)

10 "Al tiu penso", — mi diras en la antaŭparolo al la angla traduko, —

Mi tion jam ofte esprimis; sed ĝuste nun necesas, ke tio ankaŭ estu legebla antaŭ la "Manifesto" mem.

Londono, la 28-a de junio 1883

F. Engels

"kiu laŭ mia opinio kapablas doni al la historiscienco la saman progreson kiel la teorio de Darwin al la naturscienco — al tiu penso ni ambaŭ estis malrapide alproksimiĝintaj jam kelkajn jarojn antaŭ 1845. Kiom memstare mi mem estis progresinta en tiu direkto, plej bone montras mia laboro "Lage der arbeitenden Klasse in England" (La situacio de la laboranta klaso en Anglio). Sed kiam mi rerenkontiĝis kun Marx printempe de 1845 en Bruselo, li estis komplete ellaborinta tiun penson kaj metis ĝin al mi per preskaŭ same klaraj vortoj, kiel mi resumis ĝin supre. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

Antaŭparolo al la angla eldono de 1888

La "Manifesto" estis publikigita kiel platformo de la Ligo de Komunistoj, komence ekskluzive germana, pli poste internacia, kiu pro la politikaj cirkonstancoj de la eŭropa kontinento antaŭ 1848 estis neeviteble sekreta organizaĵo. Dum la Kongreso de la Ligo, kiu okazis en novembro 1847 en Londono, Marx kaj Engels estis komisiitaj, prepari kompletan teorion kaj praktikan partian programon. Verkita en germana lingvo, la manuskripto estis sendita al Londono por presado en januaro 1848, kelkajn semajnojn antaŭ la revolucio de la 24-a de februaro. Franca traduko aperis en Parizo, mallonge antaŭ la Junia Insurekcio de 1848. La unua angla traduko, farita de Miss Helen Macfarlane, aperis 1850 en "Red Republican" de George Julian Hamey (Ĥami) en Londono. Ankaŭ dana kaj pola eldonoj estis publikigitaj.

La sufoko de la Pariza Junia Insurekcio de 1848 — tiu unua granda batalo inter proletaro kaj burĝaro — portempe premis en la fonon la socialajn kaj politikajn strebadojn de la laborista klaso de Eŭropo. Ekde tiam la potenqbatalo okazis denove sole inter la diversaj grupoj de la posedanta klaso, kiel en la tempo antaŭ la Februara Revolucio. La laborista klaso estis limigita je batalo pri politika kubutlibereco kaj je la pozicio de ekstreme maldekstra alo de la radikala burĝaro. Kie memstaraj proletaj movadoj daŭrigis doni vivsignojn pri si, ili estis senkompate frakasitaj. La prusa polico ekzemple elspi-

onis la centran administrejon de la Ligo de Komunistoj, kiu siatempe havis sian sidejon en Kolonjo. La membroj estis arestitaj kaj dum oktobro 1852 kondukita antaŭ la tribunalon, post dekok-monata aresto. Tiu fama "Kolonja komunista proceso" daŭris de la 4-a de oktobro ĝis 12-a de novembro; sep de la arestitoj estis kondamnitaj je mallibero en fortikaĵo por la daŭro de tri ĝis ses jaroj. Tuj post la juĝo la Ligo estis formale malfondita flanke de la ankoraŭ restintaj membroj. Koncerne al la "Manifesto" ŝajnis, ke ĝi ekde tiam estis kondamnita al forgeso.

Post kiam la eŭropa laborista klaso estis kolektinta denove sufiĉe da forto por nova atako kontraŭ la reganta klaso, fondiĝis la Internacia Laborista Asocio. Sed tiu asocio, kiu estis fondita ekskluzive por la celo kunfandi la tutan batalpretan proletaron de Eŭropo kaj Ameriko al unu sola korpo, ne tuj povis proklami la principojn fiksitaĵojn en la "Manifesto". La Internacio devis havi programon sufiĉe larĝan, por esti akceptebla por la anglaj sindikatoj, por la francaj, belgaj, italaj kaj hispanaj adeptoj de Proudhon¹¹ kaj por la Lassalle-anoj¹² en Germanio. Marx, kiu verkis tiun programon je la kontento de ĉiuj partioj, plene fidis al la intelekta evoluo de la laborista klaso, evoluo, kiu necese devis rezulti el la unuigita agado kaj komuna diskutado. La eventoj kaj sortoŝanĝoj en la batalo kontraŭ la kapitalo, pli multe la malvenkoj ol la ven-

11 Proudhon, Pierre-Joseph (1809-1865), franca ekonomikisto kaj sociologo, publicisto, ideologo de la etburĝaro, unu el la fondintoj de la anarkismo. (*Trad.*)

12 Lassalle al mi persone ĉiam konfesis sin disĉiplo de Marx kaj kiel tiu staris sur la fundamento de la "Manifesto". Tamen, en sia publika agitado dum la jaroj 1862 – 1864 li nur restis ĉe la postuloj de produktadaj kooperativoj kun ŝtata kredito. (*Noto de Engels*)

koj, ne povis ne helpi konsciigi la homojn pri la nesufiĉeco de iliaj diversaj favoritaj ĉarlatanaĵoj, ebenigante la vojon al kompleta kompreno pri la veraj antaŭkondiĉoj por la emancipiĝo de la laborista klaso. Kaj Marx pravis. Kiam disfalis en la jaro 1874 la Internacio, ĝi postlasis la laboristojn jam en tute alia stato ol ĝi trovis ilin ĉe sia fondo en la jaro 1864. La Proudhon-ismo en Francio, la Lassalle-ismo en Germanio estis mortontaj, kaj ankaŭ la konservativaj anglaj sindikatoj, kvankam en sia plimulto ili jam longe estis rompintaj la ligojn al la Internacio, alproksimiĝis malrapide al la punkto, kie ilia prezidanto lastjare en Swansea en ilia nomo povis deklari: "La kontinenta socialismo por ni perdis sian terurecon"¹³. Vere: La principoj de la "Manifesto" faris konsiderindan progreson inter la laboristoj de ĉiuj landoj.

Tiamaniere la "Manifesto" mem denove fariĝis pli aktuala. La germana teksto ekde 1850 estis kelkfoje represita en Svisio, Anglio kaj en Ameriko. En la jaro 1872 ĝi estis tradukita en la anglan, nome en Nov-Jorko, kie la traduko aperis en "Woodhull and Claflin's Weekly". Surbaze de tiu angla versio aperis ankaŭ franca en "Le Socialiste" en Nov-Jorko. Post tio en Ameriko aperis ankoraŭ almenaŭ du anglaj tradukoj, pli malpli fuŝitaj, de kiuj unu estis represita en Anglio. La unua rusa traduko, farita de Bakunin, estis eldonita ĉirkaŭ la jaro 1863 en la presejo "Kolokol" de Herzen en Ĝenevo, dua, same en Ĝenevo, de la heroa Vera Zasuliĉ¹⁴, en la jaro 1882. Nova

13 Engels aludas al la parolado de Bevan, la prezidanto de la "Trade-Unions" (angla sindikato) de la urbo Swansea, kiun tiu estis farinta en la jaro 1887 kadre de la jarkongreso de la Trade-Unions. (*Trad.*)

14 Vera Ivanovna Zasuliĉ (1849 – 1919), rusa revoluciulino. En sia postparolo, kiun Engels en 1894 verkis al la artikolo "Socialaĵoj en

dana eldono troviĝas en la "Socialdemokratisk Bibliotek", Kopenhago 1885; nova franca traduko aperis en "Le Socialiste", 1886 en Parizo. Laŭ ĉi lasta oni preparis hispanan tradukon kaj publikigis ĝin en 1886 en Madrido. La nombro de germanaj represoj ne estas precize indikebla, estis entute almenaŭ dek du. Armena traduko, kiu devintus aperi antaŭ kelkaj monatoj en Konstantinopolo, ne povis enmondiĝi, ĉar, kiel oni komunikis al mi, la eldonisto ne kuraĝis aperi ĝin libron, sur kiu estas menciita la nomo Marx, dum la tradukisto rifuzis prezenti ĝin kiel sian propran verkon. Pri pluaj tradukoj en aliajn lingvojn mi ja aŭdis sed ilin ne vidis. Tiel la historio de la "Manifesto" altgrade spegulas la historion de la moderna laborista movado; nuntempe ĝi sendube estas la plej vaste disvastigita, plej internacia verko de la tuta socialisma literaturo, komuna programo, akceptita de milionoj da laboristoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Kiam ni estis skribintaj ĝin, ni tamen ne estus povintaj ĝin titoli **socialista** manifesto. Sub socialistoj en 1847 oni komprenis unuflanke la adeptojn de diversaj utopiecaj sistemoj: la Owen-istoj¹⁵ en Anglio, la Fourier-istoj¹⁶ en Francio, ambaŭ jam ŝrumpiĝintaj al malrapide formortantaj sektoj; aliflanke la plej multespecajn "socialajn" ĉarlatanojn, kiuj promesis forigi la sociajn mankojn per ĉiuspeca flikado, sen ajna danĝero por kapitalo kaj profito — en ambaŭ kazoj temas pri

Ruslando", li mencias kiel verkinton de la citita traduko G. V. Pleĥanov. Ankaŭ Pleĥanov atentigis en 1900 en pli posta eldono de la "Manifesto", ke la menciita traduko estas de li. (*Trad.*)

15 Adeptoj de Robert Owen (Oŭen) (1771 – 1858), angla utopieca komunisto. (*Trad.*)

16 Adeptoj de François Marie Charles Fourier (Furje) (1772 – 1837) franca utopieca socialisto. (*Trad.*)

homoj starintaj ekster la laborista movado kaj prefere serĉintaj subtenon ĉe la "kleraj" klasoj. Tiu parto de la laborista klaso, kiu estis konvinkiginta pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj reformoj kaj postulinta totalan rekonstruon de la socio, tiu parto siatempe sin nomis komunista. Temis ankoraŭ pri kruĉa, nerabotita, pure instinkta speco de komunismo; sed ĝi trafis la kardinalan punkton kaj estis sufiĉe potenca en la laborista movado, por krei la utopiecan komunismon, tiun de Cabot en Francio, tiun de Weitling en Germanio. Pro tio do en la jaro 1847 la socialismo estis movado de la meza klaso, la komunismo — movado de la laborista klaso. La socialismo estis "salonakceptebla", almenaŭ sur la kontinento; la komunismo estis la rekta kontraŭo. Kaj ĉar ekde la komenco ni opiniis, ke "la emancipado de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem", ne povis esti dubo pri tio, kiun el la du nomoj ni elektos. Eĉ pli, ekde tiam ni neniam pensis malkonfesi ĝin.

Kvankam la "Manifesto" estas nia komuna laboro, mi sentas min tamen devigita konstati, ke la fundamenta penso, kiu formas la kernon, apartenas al Marx. Tiu penso estas jena: ke en ĉiu historia epoko la reganta ekonomio kun sia maniero de produktado kaj interŝanĝado kaj la el tio neeviteble rezultanta socia strukturiĝo formas la fundamenton sur kiu konstruiĝas la politika kaj la intelekta historio de tiu epoko kaj kiu estas klarigebla nur surbaze de tiu fundamento; ke sekve la tuta historio de la homaro (ekde la malapero de la primitiva genta socio kun sia komuna terproprieto) estis historio de klasbatalo, de bataloj inter ekspluatantaj kaj ekspluatataj, regantaj kaj subpremataj klasoj; ke la historio de tiuj klasbataloj formas evoluovicon, en kiu oni nuntempe atingis ŝtupon,

kie la ekspluatata kaj subpremata klaso — la proletaro — ne povas atingi sian liberiĝon el sub la jugo de la ekspluatanta kaj reganta klaso — la burĝaro, — sen samtempe unu fojon por ĉiam liberigi la tutan socion de ĉiu ekspluatado kaj subpremado, de ĉiuj klasdiferencoj kaj klasbataloj.

Al tiu penso, kiu laŭ mia opinio kapablas doni al la histori-scienco la saman progreson kiel la teorio de Darwin al la naturscienco — al tiu penso ni ambaŭ estis malrapide alproksimiĝintaj jam kelkajn jarojn antaŭ 1845. Kiom memstare mi mem estis progresinta en tiu direkto plej bone montras mia laboraĵo "La situacio de la laboranta klaso en Anglio"¹⁷. Sed kiam mi renkontiĝis kun Marx printempe de 1845 en Bruselo, li estis komplete ellaborinta tiun penson kaj metis ĝin al mi per preskaŭ same klaraj vortoj, kiel mi resumis ĝin supre.

El nia komuna antaŭparolo al la germana eldono de 1872 mi citas jenon:

"Kiom ajn ŝanĝiĝis la cirkonstancoj dum la lastaj dudek kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj, evoluigitaj en ĉi tiu "Manifesto", entute restas plene validaj ankaŭ hodiaŭ. Jen kaj jen oni devus plibonigi detalojn. Kiel la "Manifesto" mem klariĝas, la praktika apliko de tiuj principoj ĉie kaj ĉiam dependas de la ekzistantaj historiaj kondiĉoj. Pro tio ankaŭ ne estas metita aparta akcento sur la revoluciajn intervenojn, proponitajn fine de la ĉapitro II. Tiu parto hodiaŭ aspektus multrilate alia. Rigarde al la grandega evoluo de la grandindustrio ekde 1848 kaj la plibonigita kaj progresinta partia organiziĝo de la laborista klaso, akompaninta ĝin, rigarde al la praktikaj

17 "The Condition of the Working Class in England in 1844". By Frederick Engels. Translated by Florence K. Wisohnewetzky, New York. Lovell London, W. Reeves, 1888. (*Noto de Engels*)

spertoj kolektitaj unue dum la Februara Revolucio kaj eĉ multe pli dum la Pariza Komunumo, kie unuan fojon la proletaro dum du monatoj havis la politikan potencon, rigarde al tio ĉi tiu programo hodiaŭ kelkaloke estas malnoviĝinta. La Komunumo aparte pruvis, ke 'la laborista klaso ne simple povas preni en posedon la pretan ŝtatemekanismon kaj ekfunkciigi ĝin por siaj propraj celoj' (Vidu 'The Civil War in France. Address to the General Council of the International Working-Men's Association' London, Truelove, 1871, p. 15, kie la temo estas plutraktita). Plue kompreneblas, ke la kritiko pri la socialisma literaturo hodiaŭ estas mankhava, ĉar ĝi nur traktas ĝis 1847; la samo koncernas la rimarkojn pri la rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (ĉapitro IV), kvankam ili nuntempe ankoraŭ estas ĝustaj en la bazaj trajtoj, tamen en sia prezento ili hodiaŭ estas malnoviĝintaj jam pro tio, ĉar la politika situacio totale transformiĝis kaj la historia evoluo elmondigis la plej multajn de la tie menciitaj partioj.

Tamen, la 'Manifesto' estas historia dokumento, kiun ni ne plu rajtigas nin ŝanĝi."

La prezentata traduko devenas de s-ro Samuel Moore, la tradukinto de la plej granda parto de la "Kapitalo" de Marx. Ni komune trarigardis ĝin, kaj mi aldonis kelkajn notojn por klarigi historiajn aludojn.

Londono, la 30-a de januaro 1888

Friedrich Engels

Antaŭparolo al la germana eldono de 1890

Post kiam la supra¹⁸ estis skribita, denove nova germana eldono de la "Manifesto" fariĝis necesa kaj ankaŭ multo okazis kun la "Manifesto", kio estas ĉi tie mencienda.

Dua rusa traduko — de Vera Zasuliĉ — aperis en 1882 en Ĝenevo. La antaŭparolon al tio verkis Marx kaj mi. Bedaŭrinde mi perdis la germanan originalan manuskripton, mi do devas retraduki el la rusa, per kio la laboraĵo tute ne pliboniĝas¹⁹. Ĝi tekstas:

"La unua rusa eldono de la 'Manifesto de la Komunista Partio' en la traduko de Bakunin, aperis komence de la 60-aj jaroj en la presejo de 'Kolokol'. Tiam la rusa eldono de tiu verko por la okcidento maksimume havis la signifon de literatura kuriozaĵo. Tia opinio hodiaŭ ne plu estus ebla. Kiom limigita estis la kampo de disvastigiteco de la proleta movado dum la tempo de la unua publikigo de la 'Manifesto' (januaro 1848), plej bone montras la lasta ĉapitro: 'Rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj'. Tie antaŭ ĉio mankas Ruslando kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Estis la tempo, kiam Ruslando estis la lasta granda rezervujo de la eŭropa reakcio

18 Engels aludas je la antaŭparolo al la germana eldono de 1883. (Trad.)

19 La germana originalo, kiun Engels kredis perdita, estis tamen retrovita kaj iĝis la bazo de la esperantigo de la antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882. (Trad.)

kaj kiam la elmigrado al la Unuiĝintaj Ŝtatoj absorbis la superfluajn fortojn de la eŭropa proletaro. Ambaŭ landoj provizis Eŭropon per krudmaterialoj kaj samtempe servis kiel merkatoj por la vendo de ĝiaj industriaj varoj. Do tiam ambaŭ landoj tiel aŭ aliel estis kolonoj de la eŭropa socia ordo.

Kiom ĉio ĉi hodiaŭ ŝanĝiĝis! Ĝuste la eleŭropa enmigrado ebligis la kolosan evoluon de la nordamerika agrikulturo, kies konkurenco ekskuas la fundamentojn de la granda same kiel de la malgranda terproprietoj en Eŭropo. Samtempe tio donis al la Unuiĝintaj Ŝtatoj la eblecon komenci la ekspluatadon de siaj riĉaj industriaj fontoj, kaj fari tion per tia energio kaj en tia skalo, ke tio certe finos post mallonga tempo la industrimonopolon de okcidenta Eŭropo. Kaj ambaŭ tiuj cirkonstancoj reefikas revoluciige al Ameriko mem. La malgranda kaj meza terproprietajoj de la memlaborantaj farmantoj, la bazo de la tuta politika ordo de Ameriko, estas pli kaj pli venkita per la konkurenco de la grandaj farmbieno. En la industriaj regionoj samtempe unuan fojon disvolviĝadas amasa proletaro apud neimagebla koncentriĝo de kapitaloj.

Kaj nun pri Ruslando! Dum la revolucio 1848/49 ne nur la eŭropaj monarkoj sed ankaŭ la eŭropaj burĝoj vidis en la rusa interveno la solan savon kontraŭ la proletaro, kiu ĵus konsciiĝadas pri siaj fortoj. Ili proklamis la caron ĉefo de la eŭropa reakcio. Hodiaŭ li sidas kiel militkaptito de la revolucio en Gatĉina, kaj Rusio formas la avangardon de la revolucia movado de Eŭropo.

Estis la tasko de la 'Komunista Manifesto' proklami la neeviteble antaŭstarantan pereon de la hodiaŭa burĝa proprieto. Sed en Ruslando ni trovas, krom la hastege evoluanta kapitalisma ordo kaj la nur ĵus evoluanta burĝa terproprieto, la

duonon de la tero kiel komunan proprieton de la kamparanoj.

Nun la demando: Ĉu la rusa kamparana komunumo, tiu tamen jam tre degenerita formo de origina komuna proprieto je tero, povas transiri al la pli alta komunisma formo de la terproprieto, aŭ ĉu ĝi antaŭe devas trairi la saman procezon de dissolviĝo, kiu karakterizas la historian evoluon de la Okcidento?

La hodiaŭ sole ebla respondo al tiu demando estas la sekva. Se la rusa revolucio fariĝos la signalo por laborista revolucio en la Okcidento, tiel ke ambaŭ kompletigos unu la alian, tiam la hodiaŭa rusa komuna proprieto povas servi kiel elirpunkto de komunisma evoluo.”

Londono, la 21-an de januaro 1882.

Nova pola traduko aperis proksimume samtempe en Ĝenevo: ”Manifest Komunistyczny”.

Krome aperis nova dana traduko en ”Socialdemokratisk Bibliotek”, Kopenhago 1885. Ĝi bedaŭrinde ne estas tute kompleta. Kelkaj esencaj partoj mankas, kiuj por la tradukinto ŝajne estis malfacilaj, kaj krome jen kaj jen rimarkeblas spuroj de supraĵeco, kiuj estas malagrable rimarkeblaj, des pli ĉar oni vidas en la laboro, ke la tradukinto kun iom pli da zorgemo povintus fari bonegan tradukon.

En la jaro 1886 aperis nova franca traduko en ”Le Socialiste”, Parizo; ĝi estas la ĝis nun plej bona, kiu aperis.

Post ĝi samjare aperis hispana traduko, unue en la Madrida ”El Socialista” kaj poste kiel broŝuro: ”Manifiesto del Par-

tido Komunista” por Carlos Marx y F. Engels, Madrid, Administración de “El Socialista”, Hernán Cortes 8.

Kiel kuriozaĵon mi ankoraŭ mencias, ke en 1887 oni ofertis al konstantinopola eldonisto la manuskripton de armena traduko. La bonulo tamen ne kuraĝis presi ion, sur kiu aperas la nomo Marx kaj opiniis, ke pli bone la tradukinto mem aperu kiel verkinto, kion tiu tamen rifuzis.

Post kiam en Anglio plurfoje estis represita foje tiu foje alia pli aŭ malpli erara amerika traduko, fine aperis aŭtentika traduko en la jaro 1888. Ĝi devenas de mia amiko Samuel Moore kaj antaŭ la preso estas ankoraŭfoje komune trarigardita de ni ambaŭ. La titolo estas: “Manifesto of the Communist Party”, by Karl Marx and Frederick Engels. Authorized English Translation, edited and annotated by Frederick Engels, 1888, London, William Reeves, 185 Fleet st. E. C. Kelkajn notojn de tiu eldono mi transprenis en la ĉi tie prezentitan.

La “Manifesto” havis propran biografion. En la momento de la apero entuziasme bonvenigita de la tiam ankoraŭ malgranda avangardo de la scienca socialismo (kiel pruvas la tradukoj menciitaj en la unua antaŭparolo), ĝi baldaŭ estis premita de la reakcio en la malantaŭon post la malvenko de la parizaj laboristoj en junio 1848 kaj fine “laŭleĝe” proskribita per la kondamno kontraŭ la kolonaj komunistoj, en novembro 1852²⁰. Kiam la laborista movado, kalkulita ekde la Febru-

20 En la kolonja proceso kontraŭ komunistoj (4. 10. – 12. 12. 1852) oni akuzis 12 membrojn de la Ligo de Komunistoj (1847 – 1852) pro ŝtatperfido. La akuzo baziĝis sur “protokolibro” pri la centra administrejo de la Ligo, fabrikaĵo de la prusa polico kaj sur aliaj falsaĵoj. En sia verko “Malkaŝigoj pri la kolonja proceso kontraŭ komunistoj” Marx prezentis la verajn kaŭzojn de la proceso kaj senmaskigis la prusan policismon. (*Trad.*)

ara Revolucio, malaperis de la publika scenejo, ankaŭ la "Manifesto" malaperis en la fono.

Kiam la eŭropa laborista klaso denove estis sufiĉe refortiĝinta por nova atako kontraŭ la potenco de la regantaj klasoj, kreiĝis la Internacia Laborista Asocio. Ĝi havis la celon kunfandi en **unu** grandan armean korpon la tutan batalpretan laboristaron de Eŭropo kaj Ameriko. Pro tio ĝi ne povis **eliri** de la principoj prezentitaj en la "Manifesto". Ĝi devis havi programon, kiu ne fermu la pordon al la anglaj sindikatoj, la francaj, belgaj, italaj kaj hispanaj Proudhon-istoj kaj al la germanaj Lassalle-anoj²¹. Tiu programo — la enkonduko al la statuto de la Internacio — estis skizita de Marx kun majstreco, kiun eĉ Bakunin kaj la anarkistoj agnoskis. Laŭ Marx la finfina venko de la principoj fiksitaj en la "Manifesto" venos sole el la intelekta evoluo de la laborista klaso, kiu necese rezultas el la unuigitaj agoj kaj diskutadoj. La eventoj kaj sortoŝanĝoj en la batalo kontraŭ la kapitalo, pli la malvenkoj ol la venkoj, ne povis malhelpi montri al la batalintoj la nesufiĉecon de iliaj ĝisnunaj ĉiopovaj rimedoj kaj malfermi iliajn kapojn por pli profunda kompreno de la veraj kondiĉoj por la laborista emancipado. Kaj Marx pravis. La laborista klaso de 1874, kiam la Internacio estis malfondita, estis tute alia ol tiu de 1864, kiam ĝi estis fondita. La Proudhon-ismo en la romanlingvaj landoj, la specifa Lassalle-ismo en Germanio estis mortantaj kaj eĉ la siatempe konservativegaj anglaj sin-

21 Lassalle al mi persone ĉiam konfesis sin "disciplo" de Marx kaj kiel tiu kompreneble staris sur la fundamento de la "Manifesto". Alia afero estis kun tiuj liaj adeptoj, kiuj restis ĉe la postuloj de produktadaj kooperativoj kun ŝtata kredo kaj kiuj disdividis la tutan laboristan klason en ŝtathelpantojn kaj memhelpantojn. (*Nota de Engels*)

dikatoj malrapide atingis la punkton, kiam en la jaro 1887 la prezidanto de ilia kongreso en Swansea povis deklari en ilia nomo: "La kontinenta socialismo por ni perdis sian terurecon". La kontinenta socialismo — sed tio jam en 1887 estis nur la teorio prezentita en la "Manifesto". Kaj tiel certgrade la historio de la "Manifesto" spegulas la historion de la moderna laborista movado ekde 1848. Nuntempe ĝi sendube estas la plej disvastigita, la plej internacia produkto de la tuta socialisma literaturo, la komuna programo de multaj milionoj de laboristoj ĉiulandaj de Siberio ĝis Kalifornio.

Kaj tamen, kiam ĝi aperis, ni ne estus rajtintaj nomi ĝin socialista manifesto. Sub socialistoj en 1847 oni komprenis du specojn da homoj. Unuflanke temis pri adeptoj de diversaj utopiecaj sistemoj, speciale la Owen-istoj en Anglio kaj la Fourier-istoj en Francio, ambaŭ jam tiam ŝrumpiĝintaj al nuraj malrapide formortantaj sektoj. Aliflanke la plej multspecaj sociaj ĉarlatanoj, kiuj per siaj ĉiopovaj medicinaĵoj kaj per ĉiaspeca flikado volis helpi forigi la sociajn mankojn, sen ajna danĝero por la kapitalo kaj profito. En ambaŭ kazoj temas pri homoj starintaj ekster la laborista movado kaj prefere serĉintaj subtenon ĉe la "kleraj" klasoj. Tamen tiu parto de la laboristaro, kiu estis konvinkita pri la nesufiĉeco de nuraj politikaj reformoj kaj postulis totalan rekonstruon de la socio, tiu parto siatempe sin nomis **komunista**. Estis nur malglate ellaborita, nur instinkta, foje iom kruda komunismo; sed ĝi estis sufiĉe potenca, por krei du sistemojn de la utopieca komunismo, en Francio la "ikarian" de Cabet, en Germanio tion de Weitling. Socialismo en 1847 estas burĝa movado, komunismo estas laborista movado. La socialismo, almenaŭ sur la kontinento, estis salonakceptebla, la komunismo estis la rekta

kontraŭo. Kaj ĉar ni jam tiam tre firme opiniis, ke "la emancipado de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem", dum neniu momento povis ekesti dubo, kiun el la du nomoj ni elektos. Ankaŭ poste neniam venis al ni la penso refuti ĝin.

"Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!" — Nur malmultaj voĉoj respondis, kiam ni vokis tiujn vortojn en la mondon, antaŭ nun jam 42 jaroj, ĉe la antaŭtago de la unua pariza revolucio, kiam la proletaro aperis kun siaj propraj postuloj. Sed la 28-an de septembro 1864 la proletoj de la plej multaj okcident-eŭropaj landoj unuiĝis en la Internacia Laborista Asocio, glormemore. Tamen, la Internacio mem nur vivis naŭ jarojn. Sed ke ankoraŭ vivas la de ĝi fondita eterna ligo de la proletoj el ĉiuj landoj, pli forte vivas ol iam ajn, por tio ne ekzistas pli bona atestanto ol la hodiaŭa tago. Ĉar hodiaŭ, kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, la eŭropa kaj amerika proletaroj unuan fojon inspektas siajn batalfortojn, mobilizitajn kiel **unu** armeo, sub **unu** flago kaj por **unu** proksima celo: por la okhora leĝe garantienda normala labortago, proklamita jam de la Ĝeneva Kongreso de la Internacio en 1866 kaj denove de la Pariza Laborista Kongreso en 1889²². Kaj la spektaklo de la hodiaŭa tago malfermos la okulojn al la kapitalistoj kaj ter-

22 La unua kongreso de la Internacia Laborista Asocio okazis de la 3-a ĝis 8-a de septembro 1866 en Ĝenevo. La plej gravaj decidoj de la kongreso baziĝas sur la de Marx ellaboritaj "instrukcioj por la delegitoj de la Provizora Centra Konsilantaro pri la unuopaj demandoj". La kongreso akceptis i. a. ses el la entute naŭ de Marx verkitaj punktoj, inter ili rezolucion pri limigo de la taga labortempo. La Internacia Socialista Kongreso en Parizo, kiu fariĝis la fondokongreso de la 2-a Internacio, okazis de la 14-a ĝis 20-a de julio 1889. La kongreso ellaboris la bazon por internaciaj leĝoj por

posedantoj de ĉiuj landoj pri tio, ke vere hodiaŭ la proletoj el ĉiuj landoj unuiĝis.

Se nur Marx ankoraŭ starus apud mi, por tion vidi propraokule!

Londono, la 1-a de majo 1890

F. Engels

gardi la rajtojn de la laboristoj. La decido de la kongreso, je la 1-a de majo 1890 en ĉiuj landoj organizi manifestaciojn por la okhora labortago kaj internacia solidareco, fariĝis la naskiĝa horo de la bataltago de la laborista klaso. (*Trad.*)

Antaŭparolo al la dua pola eldono de 1892

La fakto, ke fariĝis necesa nova pola eldono de la "Komunista Manifesto", donas motivaĵon por diversaj konsideroj.

Unue estas rimarkinde, ke lastatempe la "Manifesto" fariĝis kriterio por la evoluo de la grandindustrio sur la eŭropa kontinento. Tiom, kiom en difinita lando la grandindustrio plivastiĝas, tiom ankaŭ kreskas inter la laboristoj de la sama lando la postulo je klarigoj pri ilia pozicio kiel laborista klaso rilate al la posedantaj klasoj, disvastiĝas inter ili la socialista movado kaj kreskas la akirbezono al la "Manifesto". Tiel ne nur la stato de la laborista movado sed ankaŭ la evoluostato de la grandindustrio en ĉiu lando povas esti sufiĉe precize mezurata per la nombro da ekzempleroj de la "Manifesto", disvastigita en la lingvo de la lando.

Laŭ tio la pola eldono indikas decidan progreson de la pola industrio. Kaj ke tiu progreso ekde la lasta eldono, aperinta antaŭ dek jaroj, vere okazis, pri tio ne povas esti dubo. La Rusia Pollando, Kongreso-Pollando²³ fariĝis la granda industrikvartalo de la rusia regno. Dum la rusia grandindustrio estas sporade dissemita — unu parto ĉe la Finna Golfo, alia parto en la Centro (Moskvo kaj Vladimir), tria parto ĉe la Ni-

23 Kongreso-Pollando oni nomis tiun parton de Pollando, kiu fariĝis parto de Ruslando sub la oficiala nomo Reĝa Regno Pollando. Tio okazis surbaze de la decidoj de la Kongreso en Vieno en la jaroj 1814/1815. (Trad.)

gra kaj Azova Maroj, ankoraŭ aliaj dissemitaj, — la pola industrio estas kunpremita sur relative eta teritorio kaj ĝuas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu koncentriĝo. La avantaĝojn rekonis la konkurantaj rusaj fabrikantoj, kiam ili postulis protektajn importdoganojn kontraŭ Pollando, malgraŭ sia arda deziro transformi la polojn en rusojn. La malavantaĝoj — por la polaj fabrikantoj kaj por la rusa registaro — montriĝis en la rapida disvastiĝo de socialistaj ideoj inter la polaj laboristoj kaj en la kreskanta akirbezono pri la "Manifesto".

Sed la rapida evoluo de la pola industrio, superinta la rusan, estas siavice nova pruvo por la neestingebla vivoforto de la pola popolo kaj nova garantio por ĝia antaŭstaranta nacia restarigo. Sed la restarigo de sendependa forta Pollando estas afero koncernanta ne nur la polojn sed nin ĉiujn. Sincera internacia kunagado de la eŭropaj nacioj nur eblas, se ĉiu el tiuj nacioj estos plene aŭtonoma en sia propra domo. La revolucio de 1848, sub proleta flago, igis la proletajn batalintojn nur fari la laboron de la burĝaro, se ankaŭ ties testamento-realigintoj Louis Bonaparte kaj Bismarck²⁴ atingigis la sendependecon de Italio, Germanio, Hungario; sed Pollandon, kiu ekde 1792 estis farinta pli multe por la revolucio ol ĉiuj tri landoj kune, Pollandon oni lasis al sia propra sorto, kiam ĝi en 1863 malvenkis pro la dekobla rusa superforto²⁵. La sen-

24 Otto von Bismarck (1815 – 1898), prusa politikisto kaj diplomato, ludis en 1871 gravan rolon ĉe la unuigo de Germanio sub prusa egido. Li estis kanceliero de la imperiestra Germanio de 1871 – 1890. (*Trad.*)

25 Aludo al la nacia ribelo, kiu komenciĝis en januaro 1863 sur pola tero (sed parto de la rusa imperio) kaj estis kruele sufokita per la caraj trupoj. (*Trad.*)

dependecon de Pollando la nobelaro nek povis konservi nek reakiri; al la burĝaro ĝi hodiaŭ almenaŭ estas indiferenta. Kaj tamen ĝi estas neceso por la harmonia kunagado de la eŭropaj nacioj. Nur la juna pola proletaro povas elbatali ĝin, kaj en ties manoj ĝi estas sekura. Nome, la laboristoj de la tuta cetera Eŭropo same bezonas la sendependecon de Pollando kiel la polaj laboristoj mem.

Londono, la 10-a de februaro 1892

F. Engels

Antaŭparolo al la itala eldono de 1893

Al la itala leganto

La publikigo de la "Manifesto de la Komunista Partio" samtempis precize preskaŭ je la tago kun la 18-a de marto 1848, kiam okazis la revolucioj de Milano kaj Berlin, kiam en la centro de la eŭropa kontinento unuflanke kaj de la Mediteraneo aliflanke leviĝis du nacioj, kiuj ĝis tiam estis malfortigitaj pro teritoria dishakiteco kaj internaj kvereloj kaj pro tio subiĝintaj sub fremda regado. Dum Italio estis subigita al la imperiestro de Aŭstrio, Germanio devis porti, se ankaŭ ne tiel rekte, la ne malpli pezan jugon de la caro de ĉiuj rusoj. La efikoj de la 18-a de marto 1848 liberigis Italion kaj Germanion el tiu honto. Se ambaŭ grandaj nacioj estis restarigitaj kaj certagrade redonitaj al si mem en la tempo inter 1848 ĝis 1871, tiam, kiel diris Karl Marx, tio okazis pro tio, ĉar la samaj homoj, kiuj sufokis la revoluciojn de 1848, fariĝis kontraŭvole ties testamento-realgantoj.

La revolucio estis tiam ĉie la faro de la laborista klaso. Estis la laborista klaso, kiu starigis la barikadojn pagante per sia vivo. Nur la laboristoj de Parizo, kiam ili faligis la registaron, havis la deklaran celon, faligi la burĝan reĝimon. Sed kiom ajn ili konsciis la neeviteblan antagonismon, ekzistintan inter ilia propra klaso kaj la burĝaro, nek la ekonomia progreso de la lando nek la spirita evoluo de la francaj laboristaj amasoj estis atinginta tiun gradon, kiu estus ebliginta reorganizon de la socio. Pro tio fine la fruktojn de la revolucio en-

poŝigis la kapitalista klaso. En la aliaj landoj, kiel Italio, Germanio, Aŭstrio, Hungario, la laboristoj ekde la komenco faris nenion alian ol helpi al la burĝaro akiri la potencon. Tamen en neniu lando estas ebla la regado de la burĝaro sen nacia sendependeco. Tial la revolucio de 1848 devis sekvi la unuecon kaj sendependecon de la nacioj, kiuj ĝis tiam ne havis ilin: Italio, Germanio, Hungario, Pollando sekvos siatempe.

Kvankam la revolucio de 1848 ne estis socialista revolucio, ĝi tamen ebenigis la vojon al tia, pretigis al ĝi la terenon. Kun la evoluo de la grandindustrio en ĉiuj landoj la burĝa reĝimo dum la lastaj 45 jaroj estis kreinta multnombra, koncentrita kaj fortan proletaron, estis produktinta — por uzi esprimon el la "Manifesto" — sian propran tombofosiston. Sen restarigo de la sendependeco kaj sen unueco de ĉiu eŭropa nacio estus realigita nek la internacia unuiĝo de la proletaro nek trankvila komprenema kunagado de tiuj nacioj por atingi komunajn celojn. Oni nur imagu komunan internacian agadon de italaj, hungaraj, germanaj, polaj, rusaj laboristoj sub la politikaj cirkonstancoj antaŭ 1848!

La batalegoj de 1848 do ne estis vanaj, ankaŭ ne vanaj la 45 jaroj, kiuj disigas nin de tiu revolucia etapo. La fruktoj ek-maturiĝas, kaj mi nur deziras, ke la publikigo de ĉi tiu itala traduko de la "Manifesto" estu bona antaŭsigno por la venko de la itala proletaro, tiel, kiel tio estis la publikigo de la originalo por la internacia revolucio.

La "Manifesto" juste akceptas la revolucian rolon, kiun ludis la kapitalismo dum la pasinteco. La unua kapitalisma nacio estis Italio. La fino de la feŭda mezepoko kaj la komenco de la moderna kapitalisma epoko estas markitaj per gran-

da figuro — per la italo Dante, kiu samtempe estis la lasta poeto de la mezepoko kaj la unua poeto de la moderna tempo. Hodiaŭ, same kiel ĉirkaŭ la jaro 1300, komenciĝas nova historia epoko. Ĉu Italio donacos la novan Dante, kiu proklamos la naskiĝhoron de la proleta epoko?

Londono, la 1-a de februaro 1893

Friedrich Engels

MANIFESTO DE LA KOMUNISTA PARTIO

Fantomo hantas en Eŭropo — la fantomo de komunismo. Ĉiuj potencoj de la malnova Eŭropo alianciĝis por sankta ĉaskampanjo kontraŭ tiu fantomo: la Papo²⁶ kaj la Caro²⁷, Metternich²⁸ kaj Guizot²⁹, francaj radikaluloj kaj germanaj policistoj.

Kie estas tiu opozicia partio, kiu de siaj regantaj kontraŭuloj ne estas misfamigita kiel komunista? Kie estas la opozicia partio, kiu ne estis reĵetinta la stigmatizan riproĉon de komunismo kaj al la pli progresintaj opoziciuloj kaj al siaj reakciaj kontraŭuloj?

Du aferoj sekvas el tiu fakto.

La komunismo jam estas agnoskita mem kiel potenco de ĉiuj eŭropaj potencoj.

Estas urĝa tempo, ke la komunistoj antaŭ la tuta mondo malkaŝe prezentu siajn vidpunktojn, siajn celojn, siajn tendencojn kontraŭmetante al la fantomfabelo pri la komunismo manifeston de la partio mem.

26 Temas pri la papo Pius la IX-a (1792 – 1878). (*Trad.*)

27 Temas pri la caro Nikolao la Unua (1796 – 1855), nomita "ĝendarmo de Eŭropo". (*Trad.*)

28 Klemens Lothar Wenzel (Vencel), princo de Metternich (1773 – 1859), aŭstra politikisto, malamiko de ĉiuj liberalaj aŭ naciaj movadoj, kiu provis kunteni la habsburgan monarkion per absolutisma polica reĝimo. (*Trad.*)

29 François Pierre Guillaume Guizot (Gizo) (1787 – 1874), franca liberala politikisto, faligita per la Februara Revolucio 1848. (*Trad.*)

Por tiu celo komunistoj de plej diversaj nacioj kunvenis en Londono kaj skizis la sekvan Manifeston, publikigotan en la lingvoj angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana.

I. Burĝoj kaj proletoj³⁰

La historio de la tuta ĝisnuna socio³¹ estas la historio de klasbataloj.

Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebano, barono kaj servutulo, gildano kaj submajstro, unuvorte, subpremantoj kaj subprematoj, staris unu kontraŭ la alia en daŭra opozicio,

30 Sub burĝaro estas komprenata la klaso de modernaj kapitalistoj, kiuj estas posedantoj de sociaj produktado-rimedoĵoj kaj eluzas dungan laboron. Proletaro estas la klaso de la modernaj dungolaboristoj, kiuj, ĉar neposedantoj de propraj produktado-rimedoĵoj, estas devigitaj vendi sian laborforton por povi vivi. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

31 Tio signifas, precize dirite, la **skribita** historio. En 1847 la antaŭhistorio de la socio, la socia organiziĝo, kiu antaŭiris ĉiun skribitan historion, estis preskaŭ nekonata. Ekde tio Haxthausen* malkovris la komunan proprieton je tero en Rusio. Maurer** pruvis, ke ĝi estis la socia bazo, de kiu historie eliris ĉiuj germanaj triboj. Kaj iom post iom oni komprenis, ke la vilaĝa komunumo kun komuna terposedaĵo estis la praformo de la socio, de Hindio ĝis Irlando. Per sia glora malkovro de la vera naturo de gento kaj de ĝia pozicio en la tribo Morgan*** fine klarigis la internan organiziĝon de tiu praa komunisma socio en sia tipa formo. Per la disvolviĝo de tiu origina komunumo komenciĝas la disiĝo de la socio en apartaj kaj fine antagonismaj klasoj. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888 kaj al la germana eldono de 1890*)

Mi provis sekvi tiun procezon de disvolviĝo en "La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato", dua eldono, Stuttgart 1886. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

* August Haxthausen (1792 – 1866), prusa barono, kiu studis en

havis seninterrompan batalon, foje kaŝe — foje malkaŝe, batalon, kiu ĉiufoje finiĝis per revolucia transformo de la tuta socio aŭ per komuna pereco de la batalintaj klasoj.

En la antaŭaj epokoj de la historio ni preskaŭ ĉie trovas kompletan strukturiĝon de la socio en diversajn klasojn, multspecan gradigon de la sociaj rangoj. En la antikva Romo ni havas patriciojn, kavalirojn, plebanojn, sklavojn; en la Mezepoko — feŭdajn sinjorojn, vasalojn, gildanojn, submajstrojn, servutulojn, kaj aldone al tio specifajn rangogradigojn en preskaŭ ĉiu el tiuj klasoj.

La moderna burĝa socio, elirinta el la ruinoj de la feŭda socio, ne forigis la klasajn antagonismojn. Ĝi nur metis novajn klasojn, novajn subpremkondiĉojn, novajn batalformojn sur la lokon de la malnovaj.

Sed nia epoko, la epoko de la burĝaro, distingiĝas per tio, ke ĝi simpligis la klasajn antagonismojn. La tuta socio pli kaj pli fendiĝas en du grandajn malamikajn kampojn, en du grandajn klasojn, unu al la alia rekte kontraŭa: burĝaro kaj proletaro.

El la servutuloj de la Mezepoko fariĝis la palisburĝoj³² de

Ruslando (1843 – 1844) la agrikulturon kaj kampanaran vivon.
(Trad.)

** Georg Ludwig Maurer (1790 – 1872), germana historiisto, kiu studis la mezepokon. (Trad.)

*** Lewis Henry Morgan (1818 – 1881), usona etnografo, arkeologo kaj historiisto. (Trad.)

32 En la germana originalo "Pfahlbürger" (palisburĝoj). Temas pri civitanoj de la feŭda Mezepoko, loĝintaj ekster la limpalisoj de urbo, kiuj ricevis burĝajn rajtojn, i. a. liberigo el la servuteco, pro ilia kunhelpo en la protekto de la urbo (kastelo, burgo). En figura senco: mallarĝhorizonta homo, filistro, ankaŭ etburĝo. La aŭtoroj de la Manifesto uzas ambaŭ signifojn. (Trad.)

la unuaj urboj; el ĉi tiu palisburĝaro evoluis la unuaj elementoj de la burĝaro.

La malkovro de Ameriko, la ĉirkaŭnavigado de Afriko kreis al la estiĝanta burĝaro novan agadteron. La orientinda kaj ĉina merkatoj, la koloniigo de Ameriko, la komerco kun la kolonioj, entute la multiĝo de interŝanĝaĵoj kaj varoj donis al la komercado, al la navigado, al la industrio prosperon antaŭe nekonatan kaj per tio rapidan disvolvon al la revolucia elemento en la disfalanta feŭda socio.

La ĝisnuna feŭda aŭ gilda funkciado de la industrio ne plu sufiĉis por la bezonoj kreskintaj kun la novaj merkatoj. La manufakturo anstataŭis ĝin. La gildestrojn forpuŝis la industria meza klaso; la labordivido inter la diversaj kooperacioj malaperis antaŭ la labordivido en la unuopa laborejo mem.

Sed daŭre kreskis merkatoj, daŭre kreskis la bezono. Ankaŭ la manufakturo ne plu sufiĉis. Do la vaporo kaj la maŝinaro revoluciigis la industrian produktadon. Sur la lokon de la manufakturo venis la moderna grandindustrio, sur la lokon de la industria meza klaso venis la industrimilionuloj, la ĉefoj de kompletaj industriaj armeoj, la modernaj burĝoj.

La grandindustrio estis establinta la mondan merkaton, kiun preparis la malkovro de Ameriko. La monda merkato donis nemezureblan evoluon al la komerco, al la navigado, al la landaj komunikligoj. Tiu evoluo siavice reefikis pliampleksige al la industrio, kaj same kiom etendiĝis industrio, komerco, navigado, fervojoj, same tiom la burĝaro disvolviĝis multigante siajn kapitalojn, puŝante en la fonon ĉiujn klasojn hereditajn el la Mezepoko.

Ni do vidas, kiel la moderna burĝaro mem estas produk-

to de longa evoluvo, de vico da revolucioj en la sferoj de produktado kaj interŝanĝo.

Ĉiu paŝo de tiu evoluo de la burĝaro estis akompanata de konforma politika progreso. Subpremita klaso dum la feŭd-sinjora regado, armita kaj sinmemadministranta asocio en la mezepoka komunumo³³, jen sendependa urba respubliko, jen tria impostodeva klaso de la monarkio, poste dum la tempo de la manufakturo kontraŭpezo al la nobelaro en la duonfeŭda aŭ en la absoluta monarkio, entute ĉefa bazo de la grandaj monarkioj, finfine ĝi batalakiris la ekskluzivan politikan potencon en moderna reprezenta ŝtato³⁴ ekde la establo de la grandindustrio kaj de la monda merkato. La moderna ŝtatpovo nur estas komitato administranta la komunajn aferojn de la tuta burĝa klaso.

La burĝaro ludis en la historio altgrade revolucion rolon. Kie la burĝaro akiris la potencon, ĝi detruis ĉiujn feŭdajn, patriarkajn idiliajn rilatojn. Ĝi senkompate disŝiris la buntajn feŭdajn ligilojn, kiuj ligis la homon al sia natura superulo, kaj lasis neniun alian ligilon inter homo kaj homo krom la nuda memintereso, krom la senanima "kontanta monopago". Ĝi

33 "Komunumo" nomiĝis la en Francio evoluantaj urboj, eĉ antaŭ ol ili kapablis kiel "tria klaso" devigi siajn feŭdajn sinjorojn kaj mastrojn permesi lokajn memministrojn kaj politikajn rajtojn. Ĝenerale dirite, ni ĉi tie mencias kiel la tipan landon por la ekonomia evoluo de la burĝaro Anglion, por la politika evoluo Francion. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

Tiel la urboj de Italio kaj Francio nomis sian urban kunvivadon, post kiam ili estis aĉetintaj aŭ eldevigintaj de siaj feŭdaj sinjoroj la unuajn memadministratajn rajtojn. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

34 Ekz. ŝtato kun parlamento aŭ alia formo, en kiu estas reprezentataj sociaj klasoj kaj tavoloj. (*Trad.*)

dronigis en la glacian akvon de la egoisma kalkulado la sanktajn tremojn de pia ekstazo, de kavalira entuziasmo, de filistra sentimentaleco. Ĝi dissolvis la personan dignon en la interŝanĝvaloron kaj metis sur la lokon de sennombraj leĝe garantiitaj kaj bone akiritaj liberecoj la unusolan senskrupulan agadliberecon. Unuvorte, sur la lokon de ekspluatado, vualitan per religiaj kaj politikaj iluzioj, ĝi metis la ekspluatadon malkaŝan, impertinentan, rektan, brutalan.

La burĝaro senigis de ĝia aŭreolo ĉiujn agojn ĝis nun honorindajn kaj rigarditajn per pia timideco. Ĝi transformis la kuraciston, la juriston, la pastron, la poeton, la scienculon al siaj pagitaj dungaj laboristoj.

La burĝaro forŝiris de la familiaj rilatoj ties kortuŝe sentimentalan vualon kaj reduktis ĝin al pura monrilato.

La burĝaro malkaŝis, kiel la brutala fortomontro de la reakcio tiom admirita ĉe la Mezepoko, trovis sian konvenan kompletigon en la plej inerta maldiligentado. Ĝi estis la unua, kiu pruvis, kiom kapablas fari la agado de la homo. Ĝi realigis mirindaĵojn, kiuj superas la egiptajn piramidojn, romiajn akvoduktojn kaj gotikajn katedralojn. Ĝi faris ekspediciojn multe pli grandajn ol la popolmigradoj kaj krucmilitoj³⁵.

La burĝaro ne povas ekzisti sen revoluciigi seninterrompe la produktado-instrumentojn, do sekve la produktado-rilatojn, do ĉiujn sociajn rilatojn. Sed, kontraŭe al tio, neŝanĝita konservado de la malnovaj produktado-manieroj estis la plej grava ekzistokondiĉo de ĉiuj antaŭaj industriaj klasoj. La kon-

35 La krucmilitoj estis militaj kaj koloniigaj ekspedicioj dum la 11-a ĝis 13-a jarcentoj, entreprenitaj de kristanaj eŭropaj feŭdistoj kaj kavaliroj kontraŭ nekristanaj popoloj por pliampleksigi aŭ reakiri la potencon de la kristanaj feŭdistoj. (*Trad.*)

stanta revoluciigo de la produktado, la seninterrompa skualdo de ĉiuj sociaj statoj, la eternaj necerteco kaj moviĝo distingas la epokon de la burĝaro disde ĉiuj aliaj antaŭaj. Ĉiuj fikse enrustiĝintaj rilatoj kun sia postsekvo de malnove honorindaj imagoj kaj vidpunktoj estas dissolvataj, ĉiuj nove formiĝintaj malnoviĝas antaŭ ol ili povas rigidiĝi. Ĉio solida kaj daŭra forvapiĝas, ĉio sankta estas profanata, kaj la homoj finfine estas devigataj rigardi per sobraj okuloj sian vivpozicion, siajn reciprokajn rilatojn.

La bezono al daŭre pli etendita merkato por siaj varoj pelas la burĝaron ĉirkaŭ la tutan terglobon. Ĉie ĝi devas ennestiĝi, ĉie kultivadi, ĉie starigi interligojn.

Per sia ekspluatado de la monda merkato la burĝaro donis al la produktado kaj konsumado en ĉiu lando kosmopolitan karakteron. Je la granda bedaŭro de la reakciuloj ĝi fortiris la nacian grundon el sub la piedoj de la industrio. La ege malnovaj naciaj industrioj estas detruitaj kaj ankoraŭ estas detruataj ĉiutage. Ili estas forpuŝataj per novaj industrioj, kies enkonduko fariĝas vivodecida por ĉiuj civilizitaj nacioj; per industrioj prilaborantaj ne plu enlandajn krudmaterialojn, sed krudmaterialojn, kiuj venas el plej foraj regionoj kaj kies produktoj ne nur estas konsumataj en la lando mem, sed samtempe en ĉiuj mondpartoj. Sur la lokon de la malnovaj bezonoj, kontentigitaj per la enlandaj produktoj, venas novaj, kiuj postulas por sia kontentigo produktojn de la plej foraj landoj kaj klimatoj. La malnovan lokan kaj nacian memsufiĉon kaj izolitecon anstataŭas ĉien-direkta komunikado, ĉiufanka interdependeco de la nacioj. Kaj kiel en la materia tiel ankaŭ en la spirita produktado. La spiritaj produktoj de la unuopaj nacioj fariĝas komuna posedo. La nacia unuflankeco kaj limi-

giteco pli kaj fariĝas neebla, kaj el la multaj naciaj kaj lokaj literaturoj elformiĝas monda literaturo.

La burĝaro tiras ĉiujn naciojn, ankaŭ la plej barbarajn, en la civilizacion per la rapida plibonigo de ĉiuj produktadoinstrumentoj, per la senfine plifaciligita komunikado. La malaltaj prezoj de ĝiaj varoj estas la peza artilerio, per kiu ĝi teren disbatas ĉiujn ĉinajn murojn, per kiu ĝi devigas al kapitulaco la plej obstinan kontraŭfremdulan malamon de la barbaroj. Ĝi devigas ĉiujn naciojn alproprigi al si la produktadomanieron de la burĝaro, se ili ne volas pereii; ĝi devigas ilin, enkonduki ĉe si mem la tiel nomatan civilizacion, t. e. fariĝi burĝo. Unuvorte, ĝi kreas al si mondon laŭ sia propra imago.

La burĝaro subigis la kamparon al la regado de la urbo. Ĝi kreis grandegajn urbojn, ĝi altgrade pligrandigis la nombron de la urba loĝantaro kompare al la kampara, tiel elŝirinte konsiderindan parton de la loĝantaro el la idioteco de la kampara vivo. Kiel ĝi faris dependa la kamparon de la urbo, tiel ĝi faris dependaj la barbarajn kaj duonbarbarajn landojn de la civilizitaj, la kamparanajn popolojn — de la burĝaj popoloj, la orienton de la okcidento.

La burĝaro pli kaj pli nuligas la displitiĝon de la produktadorimedo, de la posedaĵo kaj de la loĝantaro. Ĝi amase kunigis la loĝantaron, centralizis la produktadorimedojn kaj koncentris la proprieton en malmultajn manojn. La necesa sekvo de tio estis la politika centralizo. Sendependaj, aŭ nur malfirme ligitaj provincoj kun malsamaj intereso, leĝoj, registaroj kaj dogansistemoj estis kunpremitaj en unu nacion, kun unu registaro, unu leĝaro, unu nacia klasintereso, unu doganlimo.

Dum sia apenaŭ centjara klasa regado la burĝaro kreis pli

da amasaj kaj pli da kolosaj produktado-fortoj ol ĉiuj antaŭaj generacioj kune. Subjugigo de naturfortoj al la homo, maŝinaro, aplikado de la kemio por industrio kaj agrokulturo, vaporŝipado, fervojoj, elektraj telegrafoj, kultivado de kompletaj mondpartoj, navigebligado de riveroj, tutaj loĝantaroj kvazaŭ elpremitaj el la tero — kiu antaŭa jarcento antaŭsentis, ke tiaj produktado-fortoj dormetis en la sino de la socia laboro?

Ni do vidis: La produktado-rimedo kaj la rimedo de interkomunikado surbaze de kiuj formiĝis la burĝaro, estis kreitaj en la feŭda socio. Dum certa evoluŝtupo de ĉi tiuj rimedoj de produktado kaj interkomunikado la cirkonstancoj, sub kiuj la feŭda socio produktis kaj interŝanĝis, la feŭda organizado de la agrikulturo kaj manufakturo, unuvorte, la feŭdaj proprieto-rilatoj, ne plu respondis al la jam evoluintaj produktivaj fortoj. Ili malhelpis la produktadon anstataŭ ĝin akceli. Ili ŝanĝiĝis al same multaj katenoj. Ili devis esti rompitaĵoj, ili estis rompitaĵoj.

Sur ilian lokon venis la libera konkurenco kun politika kaj socia konstitucioj adaptitaj al ĝi, kun la ekonomia kaj politika regadoj de la burĝa klaso.

Antaŭ niaj okuloj okazas simila moviĝo. La moderna burĝa socio kun siaj rilatoj de produktado, interŝanĝado kaj proprieto, do socio, kiu elserĉis tiajn gigantajn rimedojn de produktado kaj interŝanĝado, similas al la magiisto, kiu ne plu kapablas regi la inferajn potencojn, kiujn li elvokis. Ekde jardekoj la historio de la industrio kaj de la komerco estas nur la historio de ribelado de la modernaj produktivaj fortoj kontraŭ la modernaj produktado-rilatoj, kontraŭ la proprieto-rilatoj, kiuj estas la ekzistokondiĉoj de la burĝaro kaj de ĝia

regado. Sufiĉas mencii la komerckrizojn, kiuj, periode revenantaj, ĉiam pli minace dubindigas la ekziston de la tuta burĝa socio. Dum la komerckrizoj regule estas detruata ne nur granda parto de la produktitaj varoj, sed ankaŭ de la jam kreitaj produktivaj fortoj. Dum tiuj krizoj eksplodas socia epidemio, kiu al ĉiuj antaŭaj epokoj estus ŝajninta absurdaĵo — la epidemio de la troproduktado. Subite la socio sin trovas repuŝita al stato de pormomenta barbareco; ŝajnas al ĝi, kvazaŭ malsatmizero, ĉion neniiga milito estas fortranĉinta de ĝi ĉiujn nutraĵojn; ŝajnas neniigitaj la industrio, la komerco. Kaj kial? Ĉar ĝi posedas tro da civilizacio, tro da nutraĵoj, tro da industrio, tro da komerco. La al ĝi disponeblaj produktivaj fortoj ne plu servas al la disvolviĝo de la burĝaj proprieterilatoj; kontraŭe, ili fariĝis por tiuj rilatoj tro gigantaj kaj estas bremsataj per ili; kaj kiam tiuj produktivaj fortoj venkas ĉi tiun malhelpaĵon, ili malordigas la tutan burĝan socion, minacas la ekziston de la burĝa proprieto. La burĝaj rilatoj fariĝis tro malvastaj por enteni la de ĝi kreitan riĉaĵon. — Per kio la burĝaro venkas la krizojn? Unuflanke per la devigita detruo de amaso da produktivaj fortoj; aliflanke per la konkero de novaj merkatoj kaj la ĝisfunda ekspluatado de malnovaj merkatoj. Do per kio? Per tio, ke ĝi preparas pli kompleksajn kaj pli gigantajn krizojn reduktante la rimedojn por preventi la krizojn.

La armiloj, per kiuj la burĝaro faligis la feŭdismon, nun direktiĝas kontraŭ la burĝaro mem.

Sed la burĝaro ne nur forĝis la armilojn, kiuj portos al ĝi la morton; ĝi ankaŭ generis la homojn, kiuj uzos tiujn armilojn — la modernajn laboristojn, la proletojn.

Same kiom disvolviĝas la burĝaro, t. e. la kapitalo, same

tiom disvolviĝas la proletaro, la klaso de la modernaj laboristoj, kiuj vivos nur tiom longe kiom ili trovos laboron, kaj kiuj trovos laboron nur tiom longe kiom ilia laboro kreskigas la kapitalon. Tiuj laboristoj, kiuj devas vendi sin popece, estas varoj kiel ĉiu alia komerca artiklo kaj tial regule elmetataj al ĉiuj ŝanĝiĝoj de la konkurenco, al ĉiuj ŝanceliĝadoj de la merkato.

La laboro de la proletoj perdis ĉiun memstaran karakteron kaj per tio ĉiun allogon por la laboristoj pro la plivastiĝanta uzado de maŝinoj kaj la labordivido. Ili fariĝis nura aldonaĵo de la maŝino, de kiu estas postulata nur la plej simpla, plej monotona, plej facile lernebla manmovado. La kostoj, kiujn kaŭzas la laboristo, limiĝas pro tio preskaŭ nur al la nutraĵo, kiujn li bezonas por sia vivteno kaj por la generado de sia raso. La prezo de varo, sekve ankaŭ de la laboro, egalas al ties produkto-kostoj. Same kiom kreskadas la malagrabeco de la laboro, same tiom malkreskas la salajro. Ankoraŭ pli, same kiom kreskadas la maŝinaro kaj labordivido, same tiom ankaŭ kreskadas la laborkvanto, ĉu pro plimultiĝo de laboro postulata dum fiksita tempo, ĉu pro plialtigita rapideco de maŝinoj ktp.

La moderna industrio transformis la malgrandan metiejon de la patriarka majstro en la grandan fabrikon de industria kapitalisto. Laboristaj amasoj, kunpremitaj en la fabriko, estas organizitaj kiel soldatoj. Kiel simplaj industrisoldatoj ili estas metitaj sub la komandon de kompleta hierarkio de suboficiroj kaj oficiroj. Ili ne nur estas sklavoj de la burĝa klaso, en la burĝa ŝtato, ili estas ĉiutage kaj ĉiuhore sklavigitaj de la maŝino, de la kontrolisto kaj antaŭ ĉio de la unuopaj fabrikantaj burĝoj mem. Ju pli malkaŝe ĝi proklamas la gajnon kiel

sian celon, des pli pedanta, malica, fanatika estas tiu despoteco.

Ju malpli la manlaboro bezonas lertecon kaj forton, t. e. ju pli la moderna industrio evoluas, des pli la laboro de la viroj estas forpuŝata per la laboro de la virinoj. Diferencoj laŭ sekso kaj aĝo ne plu havas socian valoron por la laborista klaso. Ĉiuj estas laborinstrumentoj, kiuj kaŭzas malsamajn kostojn laŭ aĝo kaj sekso.

Apenaŭ la ekspluatado de la laboristo fare de la fabrikposedanto atingis tiun punkton, ke li ricevas sian salajron en kontanta mono, tuj atakas lin la aliaj partoj de la burĝaro: la domposedanto, la vendejestro, la lombardisto ktp.

La ĝisnunaj subaj tavoloj de la meza klaso, la etindustriistoj, komercistoj kaj rentuloj, la metiistoj kaj kamparanoj, ĉiuj ĉi klasoj sinkas en la proletaron, parte pro tio, ĉar venkita en la konkurenco kun la pli grandaj kapitalistoj, ilia eta kapitalo ne sufiĉas por la funkciigado de granda industrio, parte pro tio, ĉar ilia lerteco fariĝas senvalora pro novaj produktado-manieroj. Tial la proletaro devenas el ĉiuj klasoj de la loĝantaro.

La proletaro trairas diversajn evoluŝtupojn. Ĝia batalo kontraŭ la burĝaro komenciĝas kun sia ekzisto.

Komence batalis unuopaj laboristoj, poste la laboristoj de unu fabriko, poste la laboristoj de profesiobranĉo en unu loko kontraŭ tiu individua burĝo, kiu rekte ekspluatas ilin. Ili direktas siajn atakojn ne nur kontraŭ la burĝaj produktado-kondiĉoj, sed ankaŭ kontraŭ la produktado-instrumentoj mem; ili detruas la fremdajn konkurencajn varojn, ili disbata la maŝinojn, bruligas la fabrikojn, ili provas reakiri la malaperintan pozicion de la mezepoka laborulo.

Sur tiu ŝtupo la laboristoj formas amason dissemitan tra la tuta lando kaj dissplitigitan per la konkurenco. Amasa solidareco de la laboristoj ankoraŭ ne estas sekvo de ilia propra unuiĝo, sed sekvo de unuiĝo de la burĝaro, kiu devas movi kaj provizore ankoraŭ povas movi la proletaron por atingi siajn proprajn politikajn celojn. Sur ĉi tiu ŝtupo la proletoj do ne batalas kontraŭ siaj malamikoj, sed kontraŭ la malamikoj de siaj malamikoj, kontraŭ la restaĵoj de la absoluta monarkio, la terposedantoj, la neindustriaj burĝoj, la etburĝoj. Tiel la tuta historia movado estas koncentrita en la manoj de la burĝaro; ĉiu tiel akirita venko estas venko de la burĝaro.

Sed kun la disvolviĝo de la industrio ne nur plimultiĝas la proletaro; ĝi estas koncentrata en pli grandajn amasojn, kreskas ĝia forto, kiun ĝi pli sentas. Interne de la proletaro la intereso, la vivsituaĵoj pli kaj pli interregaliĝas, ĉar la maŝinaro pli kaj pli forviŝas la diferencojn de la laboro preskaŭ ĉie suben premanta la salajron sur same malaltan nivelon. — La kreskanta konkurenco de la burĝaro inter si kaj la komerc-krizoj rezultantaj el tio faras la salajron de la laboristoj ĉiam pli malstabila. La ĉiam pli rapide progresanta senĉesa pliboniĝo de la maŝinaro ĉiam pli malcertigas ilian tutan vivsituaĵon. La kolizioj inter la unuopa laboristo kaj la unuopa burĝo ĉiam pli ekhavas la karakteron de kolizio inter du klasoj. La laboristoj komencas fondi koaliciojn kontraŭ la burĝoj; ili kuniĝas por defendi sian salajron. Ili mem fondas konstantajn asociojn, por provianta sin por okazaj ribeloj. Kelkloke la bataloj fariĝas ribeloj.

De tempo al tempo la laboristoj venkas, sed nur provizore. La propra rezulto de iliaj bataloj ne estas la senpera sukceso, sed la daŭre etendiĝanta unuiĝo de la laboristoj. Tion

helpas la kreskantaj rimedoj de komunikado, produktataj de la grandindustrio kaj kunligantaj la diverslokajn laboristojn. Nur necesas kunligo, por centralizi la multajn ĉie samkarakterajn lokajn batalojn al nacia batalo, al klasbatalo. Sed ĉiu klasbatalo estas politika batalo. Kaj la unuiĝon, por kies atingo la burĝoj de la mezepoko kun siaj mizeraj ŝoseoj bezonis jarcentojn, la modernaj proletoj per la fervojoj realigos dum malmultaj jaroj.

Ĉi tiu organiziĝo de la proletaro al klaso, kaj per tio al politika partio, ĉiumomente estas denove rompata per la konkurenco inter la laboristoj mem. Sed ĉiam denove ĝi rekreiĝas, pli forte, pli firme, pli potence. Ĝi eldevigas la rekonon de iuj interesoj de la laboristoj en leĝa formo, eluzante la skismojn de la burĝaro inter si. Ekzemplo estas la leĝo pri dek-hora labortago en Anglio.

Entute la kolizioj de la malnova socio multrilate akcelas la evoluon de la proletaro. La burĝaro troviĝas en konstanta batalo: Unue kontraŭ *la aristokratio*; poste kontraŭ tiuj partoj de la burĝaro mem, kies interesoj fariĝas kontraŭaj al la progreso de la industrio; daŭre kontraŭ la burĝaro de eksterlando. Dum ĉiuj ĉi bataloj ĝi sentas sin devigita apelacii al la proletaro, uzante ties helpon kaj tiel entirante ĝin en la politikan movadon. Ĝi mem do tiel disponigas al la proletaro siajn proprajn elementojn de politika kaj ĝenerala klereco, alivorte, ĝi donas al la proletaro la armilojn por batalo kontraŭ la burĝaro.

Plie, kiel ni vidis, per la progreso de la industrio tutaj partoj de la reganta klaso estas suben ĵetataj en la proletaron aŭ almenaŭ minacataj en siaj ekzistokondiĉoj. Ankaŭ ili provizas la proletaron per amaso da klerigaj elementoj.

Dum la tempoj, fine, kiam la klasbatalo proksimiĝas al decido, la procezo de dissolviĝo interne de la reganta klaso, interne de la tuta malnova socio fariĝas tiel impeta, akra, ke eta parto de la reganta klaso forlasas sian klason kaj aliĝas al la revolucia klaso, al la klaso portanta en siaj manoj la estontecon. Same kiel antaŭe parto de la nobelaro transiris al la burĝaro, tiel nun parto de la burĝaro transiras al la proletaro, kaj aparte parto de la burĝaj ideologoj, kiuj atingis per studado la teoriantan komprenon de la tuta historia movado.

De ĉiuj klasoj starantaj hodiaŭ vidalvide al la burĝaro, nur la proletaro estas vere revolucia klaso. La aliaj klasoj degeneras kaj malaperas kun la grandindustrio, kies plej esenca produkto estas la proletaro.

La mezaj klasoj, la etindustriisto, la etkomercisto, la metiisto, la kamparano — ili ĉiuj batalas kontraŭ la burĝaro, por savi sian ekziston kiel mezaj klasoj antaŭ la pereco. Sekve ili ne estas revoluciaj sed konservativaj. Eĉ pli, ili estas reakciaj, ili klopodas retroturni la radon de la historio. Se ili estas revoluciaj, tiam nur rilate la por ili antaŭstarantan transiron al la proletaro. Pro tio ili defendas ne siajn aktualajn sed siajn estontajn interesojn, tiel forlasante sian propran starpunkton por transiri al tiu de la proletaro.

La ĉifonproletaro³⁶, tiu pasiva putraĵo de la plej malaltaj tavoloj de la malnova socio, estas parte entirata en la mova-

36 En la germana originalo "Lumpenproletariat" ĉifonproletaro. Unu el la plej subaj sociaj tavoloj en kapitalismaj landoj (almozuloj, vagabondoj, krimuloj, prostituitinoj k. s.). Pro la konstanta senlaboreco kaj ruinigado de etburĝoj daŭre aperas tiu tavolo, el kiu la reakciularo facile prenas strikrompulojn, spionojn, provokistojn k. s. La ĉifonproletaro estas nekapabla organizi sin por politika batalo. (*Trad.*)

don per la proleta revolucio. Laŭ sia tuta vivsituacio ĝi inklinos esti subaĉetebla por reakciaj intrigoj.

En la vivkondiĉoj de la proletaro jam estas detruitaj la vivkondiĉoj de la malnova socio. La proleto estas sen posedaĵo; lia rilato al edzino kaj infanoj ne plu havas ion komunan kun la burĝa familia rilato. La moderna industria laboro, la moderna subjugigo sub la kapitalon, sama en Anglio kiel en Francio, en Ameriko kiel en Germanio, senigis lin de ĉiu nacia karaktero. Por li la leĝoj, la moralo, la religio nur estas multaj burĝaj antaŭjuĝoj, malantaŭ kiuj sin kaŝas same multaj burĝaj interesoj.

Ĉiuj antaŭaj klasoj, kiuj estis konkerintaj por si la regadon, klopodis sekurigi al si la jam akiritan vivstatuson submetinte la tutan socion sub la kondiĉojn de sia alproprigo. La proletoj povas konkeri la sociajn produktivajn fortojn nur, se ili neniigos sian propran ĝisnunon, kaj tiel la tutan ĝisnunon manieron de alproprigo. La proletoj havas nenion propran por sekurigi, ili devas detrui ĉiujn ĝisnunajn sekurecojn kaj asekurojn de la privata proprieto.

Ĉiuj ĝisnunaj movadoj estis movadoj de minoritatoj aŭ en la intereso de minoritatoj. La proletara movado estas la memstara movado de la grandega majoritato en la intereso de la grandega majoritato. La proletaro, la plej malsupra tavolo de la nuna socio, ne povas leviĝi, nek ekstari, sen ke estu eksplozita la tuta superstrukturo de la tavoloj, formantaj la oficialan socion.

Laŭ la formo, kvankam ne laŭ enhavo, la batalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro estas komence nacia batalo. La proletaro de ĉiu lando kompreneble unue devas reguligi siajn aferojn kun la propra burĝaro.

Desegnante la plej ĝeneralajn evolufazojn de la proletaro, ni sekvis la pli aŭ malpli kaŝitan civitanan militon interne de ekzistanta socio ĝis tiu punkto, kie ĝi eksplodos kiel malkaŝa revolucio kaj la proletaro establas sian regadon per la perforta detronigo de la burĝaro.

Kiel ni vidis, ĉiu ĝisnuna socio baziĝis je la antagonismo inter subpremintaĵ kaj subpremitaj klasoj. Sed por povi subpremi klason, ĝi devas havi tiajn sekurigitajn kondiĉojn, en kies kadro ĝi almenaŭ povas elteni sian sklaveccon ekzistadon. La servutulo perlaboris la statuson de membro de la servuteca komunumo, same kiel la etburĝo evoluis al burĝo sub la jugo de la feŭda absolutismo. Kontraŭe, la moderna laboristo, anstataŭ suprenleviĝi per la industria progreso, sinkas ĉiam pli kaj pli profunden sub la kondiĉojn de sia propra klaso. La laboristo fariĝas malriĉegulo, kaj la paŭperismo evoluadas pli rapide ol la loĝantaro kaj riĉeco. Per tio klare evidentiĝas, ke la burĝaro estas malkapabla ankoraŭ pli longe resti la reganta klaso de la socio, altrudante al la socio la vivkondiĉojn de sia klaso kiel ĉionreguliga leĝo. Ĝi estas malkapabla regi, ĉar ĝi malkapablas sekurigi la ekzistadon al sia sklavo eĉ interne de ties sklaveco, ĉar ĝi estas devigita lasi sinki lin en situacion, kie ĝi devas nutri lin anstataŭ esti nutrata de li. La socio ne plu povas vivi sub tia burĝaro, t.e. ĝia vivo ne plu estas akordigebla kun la socio.

La esenca kondiĉo por la ekzistado kaj por la regado de la burĝa klaso estas la amasigo de riĉaĵoj en la manoj de privatuloj, la kreado kaj kreskado de la kapitalo; la kondiĉo por la kapitalo estas la dunga laboro. La dunga laboro ekskluzive baziĝas je la konkurenco de la laboristoj inter si. La progreso de la industrio, kies senvola kaj senkontraŭstara por-

tanto estas la burĝaro, metas sur la lokon de la izoliĝo de la laboristoj per la konkurenco sian revolucion unuigon per la asociiĝo. Do la evoluo de la grandindustrio eltiras sub la piedoj de la burĝaro la bazon mem, sur kiu ĝi produktas kaj alproprigas al si la produktojn. Ĝi produktas antaŭ ĉio sian propran tombofosiston. Ĝia pereado kaj la venko de la proletaro estas same neeviteblaj.

II. Proletoj kaj komunistoj

Kia estas la rilato de la komunistoj al la proletoj kiel tuto? La komunistoj ne estas aparta partio kontraŭ la aliaj laboristaj partioj.

Ili ne havas interesojn apartajn de la tuta proletaro.

Ili starigas neniujn sektecajn principojn, laŭ kiuj ili volas fasoni la proletan movadon.

La komunistoj distingiĝas de la aliaj proletaj partioj nur per tio:

1. En la diversaj naciaj bataloj de la proletoj ili elstarigas kaj respektigas la komunajn interesojn de la tuta proletaro, sendependajn de la nacieco.

2. En la diversaj evoluŝtupoj, kiujn trapasas la batalo inter proletaro kaj burĝaro, ili ĉiam reprezentas la interesojn de la tuta movado.

Do, la komunistoj praktike estas la plej energia, ĉiam antaŭenpuŝa parto de la laboristaj partioj de ĉiuj landoj; ilia avantaĝo rilate la alian amason de la proletaro estas, ke ili disponas ekkonojn pri la kondiĉoj, la marŝlinio kaj la ĝeneralaj rezultoj de la proleta movado.

La plej proksima celo de la komunistoj estas la sama kiel ĉe ĉiuj aliaj proletaj partioj: formado de la proletaro al klaso, faligo de la burĝara regado, konkero de la politika potenco flanke de la proletaro.

La teoriaj konceptoj de la komunistoj tute ne baziĝas je

ideoj aŭ principoj inventitaj aŭ malkovritaj de tiu aŭ alia mondreformanto.

Ili nur estas ĝeneralaj esprimoj de realaj kondiĉoj de ekzistanta klasbatalo, de historia movado okazanta antaŭ niaj okuloj. La forigo de ĝisnunaj proprieto-rilatoj ne estas aparta trajto distinganta la komunismon.

Ĉiuj proprieto-rilatoj estis subjekto de daŭra historia ŝanĝo, de daŭra historia transformiĝo.

La Franca Revolucio ekzemple forigis la feŭdan proprieton favore al la burĝa.

Kio distingas la komunismon, ne estas la ĝenerala forigo de la proprieto, sed la forigo de la burĝa proprieto.

Sed la moderna burĝa privata proprieto estas la lasta kaj plej perfekta esprimo de sistemo de kreado kaj alproprigo de produktoj, kiu baziĝas sur klasaj antagonismoj, sur la ekspluatado de unuj fare de la aliaj.

Ĉi-sence la komunistoj povas resumi sian teorion per jena sola frazo: forigo de la privata proprieto.

Oni riproĉis al ni, komunistoj, ke ni volas forigi la persone akiritan mem perlaboritan proprietaĵon. La proprietaĵon, kiu formas la bazon de ĉiuj personaj libereco, agado kaj memstareco.

Perlaborita, akirita, memgajnita proprietaĵo! Ĉu vi parolas pri la etburĝa, etkamparana proprietaĵo, kiu antaŭiris la burĝan proprietaĵon? Ni ne devas forigi ĝin, la evoluo de la industrio forigis ĝin kaj ĝin forigadas ĉiutage.

Aŭ ĉu vi parolas pri la moderna burĝa privata proprietaĵo?

Sed ĉu la dunga laboro, la laboro de la proleto havigas al li proprietaĵon? Neniel. Ĝi kreas la kapitalon, t.e. tiun proprietaĵon, kiu ekspluatas la dungan laboron. Kaj tiu nur kreskas,

kondiĉe, ke ĝi produktas novan dungan laboron por povi de-nove ekspluati tiun dungan laboron. La proprietaĵo en sia nuntempa formo baziĝas sur la antagonismo inter kapitalo kaj dunga laboro. Ni rigardu ambaŭ flankojn de tiu antago-nismo.

Esti kapitalisto ne nur signifas havi pure personan sed so-cian statuson en la produktado. La kapitalo estas kolektiva produkto kaj povas esti ekmovigita nur per komuna agado de multaj membroj, ja finfine nur per la komuna agado de ĉiuj membroj de la socio.

La kapitalo do ne estas persona, ĝi estas socia potenco.

Se do la kapitalo estas transformata en komunan proprie-taĵon, apartenantan al ĉiuj membroj de la socio, tiam perso-na proprietaĵo ne transformiĝas en socian. Nur la socia karak-tero de la proprietaĵo transformiĝas. Ĝi perdas sian klasan karakteron.

Ni prenu la dungan laboron.

La meza prezo de la dunga laboro estas la minimumo de la salajro, t.e. la kvanto de nutraĵoj, necesaj por vivteni la la-boriston kiel laboristo. Sekve, kion la dungito alproprigas al si per sia laboro, nur sufiĉas por reprodukti sian nuran vivon. Ni tute ne volas forigi tiun personan alproprigon de la labor-produktoj por reproduktado de la nura vivo, alproprigo ne postlasanta iun surpluson, kiu povus doni regpovon pri frem-da laboro. Ni volas nur nuligi la mizeran karakteron de tiu alproprigo, ĉe kiu la laboristo nur vivas por kreskigi la kapi-talon, nur vivas tiom, kiom tion necesigas la intereso de la reganta klaso.

En la burĝa socio la viva laboro nur estas rimedo, por mul-tigi la akumulitan laboron. En la komunisma socio la akumu-

lita laboro nur estas rimedo por plivastigi la vivprocezon de la laboristoj, por riĉigi kaj akceli ĝin.

En la burĝa socio la pasinteco do regas super la nuntempo; en la komunisma socio la nuntempo regas super la pasinteco. En la burĝa socio la kapitalo estas memstara kaj havas individuecon, dum la aganta persono estas dependa kaj ne havas individuecon.

Kaj la forigon de tiu situacio la burĝaro nomas forigo de la individueco kaj libereco! Kaj prave. Sed ja temas pri la forigo de la burĝaj individueco, memstareco kaj libereco.

En la nunaj burĝaj produktado-kondiĉoj sub libereco oni komprenas la liberan komercon, la liberajn aĉeton kaj vendon.

Sed se malaperos la negocado, ankaŭ malaperos la libera negocado. La grandaj vortoj pri la libera negocado, same kiel ĉiuj aliaj fanfaronadoj de nia burĝaro pri libereco, nur havas sencon, se entute, rilate la limigitan negocadon, rilate la sklavigitan burĝon de la mezepoko, sed ne rilate la komunistan forigon de la negocado, de la burĝaj produktado-rilatoj kaj de la burĝaro mem.

Vi terurigas, ke ni volas forigi la privatan proprietaĵon. Sed en via ekzistanta socio la privata proprietaĵo estas forigita por naŭ dekonaj de la membroj, ĝi ĝuste tial ekzistas, ĉar por naŭ dekonaj ĝi ne ekzistas. Vi do riproĉas al ni, ke ni volas forigi proprietaĵon por kies ekzisto la necesa kondiĉo estas la neekzisto de iu ajn proprietaĵo por la grandega majoritato de la socio.

Unuvorte, vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi vian proprietaĵon. Ĝuste tiel, tion ni volas.

Ekde tiu momento, kiam laboro ne plu estas transforme-

bla en kapitalon, monon, terenton, tio signifas, ne plu estas transformebla en monopoligeblan socian potencon, do, ekde tiu momento, kiam la persona proprietaĵo ne plu povas transformiĝi en burĝan, ekde tiu momento vi deklaras, ke la individuo estas neniigita.

Vi do konfesas, ke sub individuo vi celas neniun alian personon ol la burĝon, la burĝan proprietulon. Kaj, vere, tiun personon ni ja volas neniigi.

La komunismo forprenas de neniuj la potencon alproprigi al si sociajn produktojn, ĝi nur forprenas la potencon subjugi fremdan laboron per tiu alproprigo.

Oni kontraŭargumentis, ke per la forigo de la privata proprietaĵo ĉesos ĉiu agado kaj disvastiĝos ĝenerala mallaboremo.

Laŭ tio la burĝa socio jam longe devus esti pereinta pro inertececo, ĝuste tiuj, kiuj laboras en ĝi, nenion gajnas, kaj tiuj, kiuj gajnas, ne laboras. La tuta pripenso sekvigas la taŭtologion: ne plu povas ekzisti dunga laboro se ne plu ekzistas kapitalo.

Ĉiuj objektoj direktitaj kontraŭ la maniero de la komunismaj alproprigo kaj produktado de la materiaj produktoj estas same direktitaj kontraŭ la alproprigo kaj produktado de la intelektaj produktoj. Same kiel por la burĝo la malaperado de la klasa proprietaĵo signifas la malaperon de la produktado mem, same por li malaperado de la klasa klereco identas kun la malaperado de la klereco entute.

La klereco, kies perdon li bedaŭras, por la granda majoritato estas la klerigo agi kiel maŝino.

Sed ne disputu kun ni aplikante viajn burĝajn konceptojn pri libereco, klereco, rajtoj ktp al nia koncepto pri la forigo de

la burĝa proprietaĵo. Viaj ideoj mem estas kreaĵoj de la burĝaj kondiĉoj de produktado kaj proprieto, same kiel via juro nur estas la leĝigita volo de via klaso, volo, kies enhavo baziĝas sur la materialaj vivkondiĉoj de via klaso.

La egoisma koncepto, laŭ kiu vi ŝanĝas en eternajn leĝojn de la naturo kaj produktado viajn produktado-manierojn kaj proprieto-kondiĉojn — historiaj rilatoj, venkantaj kaj malaperantaj dum la paso de la produktado, — tiun koncepton vi havas komuna kun ĉiuj aliaj malaperintaj regintaj klasoj. Kion vi konceptas kiel antikvan proprieton, kion vi konceptas kiel feŭdan proprieton, vi ne plu rajtas koncepti por la burĝa proprieto.

Forigo de la familio! Eĉ la plej radikalaj ekscitiĝas pri tiu fia intenco de la komunistoj.

Sur kio baziĝas la nuntempa, la burĝa familio? Sur la kapitalo, sur la privata gajno. Plene disvolvita tiu familio nur ekzistas por la burĝaro. Sed ĝi trovas sian kompletigon en la eldevigita senfamalieco de la proletoj kaj en la publika prostituado.

La familio de la burĝo kompreneble malaperos kun la malapero de tiu kompletigo, kaj ambaŭ malaperos kun la malapero de la kapitalo.

Ĉu vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi la ekspluatadon de la infanoj flanke de iliaj gepatroj? Ni konfesas tiun krimon.

Sed, vi diros, ni detruas la plej intimajn rilatojn anstataŭante la hejman edukadon per la socia.

Kaj, ĉu ne ankaŭ via edukado estas determinita per la socio? Per la sociaj rilatoj, sub kiuj vi edukadas, per la rekta aŭ nereakta enmiksiĝo de la socio, pere de lernejo ktp? La komunistoj ne inventis la efikon de la socio al la edukado; ili nur

ŝanĝas ties karakteron, ili tiras la edukadon el la influo de la reganta klaso.

La burĝaj sensencaj frazoj pri familio kaj edukado, pri la intima rilato inter gepatroj kaj infanoj, fariĝas des pli naŭzaj ju pli multe ĉiuj familiaj ligoj de la proletoj disŝiriĝas pro la grandindustrio kaj la infanoj transformiĝas al simplaj komercaj varoj kaj laboriloj.

Sed vi komunistoj volas enkonduki la komunan posedon pri virinoj, krias al ni koruse la burĝaro.

La burĝo vidas en sia edzino nuran produktado-instrumenton. Li aŭdas, ke la produktado-instrumentoj estu komune ekspluatataj, kaj kompreneble li nur povas veni al la konkludo, ke la sorto de la komuna sociigo same trafos la virinojn.

Li ne suspektas, ke ĝuste necesas forigi la pozicion de la virinoj kiel nuraj produktado-instrumentoj.

Cetere, nenio estas pli ridinda ol la moralega ŝoko de niaj burĝoj pri la laŭdire oficiala komuna posedo pri virinoj ĉe la komunistoj. La komunistoj ne devas enkonduki la komunan posedon pri virinoj, ĝi preskaŭ ĉiam ekzistis.

Niaj burĝoj, ne kontentaj ke al ilia dispono estas la virinoj kaj filinoj de iliaj proletoj — ne parolante pri la oficiala prostituado — trovas grandan plezuron en la reciproka delogado de siaj edzinoj.

La burĝa geedzeco en vero estas komuna posedo pri edzinoj. Maksimume oni povus riproĉi al la komunistoj, ke ili volas enkonduki oficialan, malkaŝan komunan posedon pri virinoj anstataŭe al la hipokrite kaŝita. Cetere estas memkompreneble, ke kun la forigo de la nunaj produktadorilatoj an-

kaŭ malaperos la el tio deveninta komuna posedo pri virinoj, t.s. la oficiala kaj neoficiala prostituadoj.

Al la komunistoj oni krome riproĉis, ke ili volas forigi la patrujon, la naciecon.

La laboristoj ne havas patrujon. Oni ne povas de ili preni, kion ili ne posedas. Devante unue konkeri la politikan potencon, evolui al nacia klaso, mem konstituiĝi al nacio, la proleto mem ankoraŭ estas nacia, eĉ se tute ne en la senco de la burĝaro.

La naciaj diferencoj kaj antagonismoj inter la popoloj malaperas pli kaj pli jam pro la evoluo de la burĝaro, la libereco de la komerco, la monda merkato, la monotoneco de la industria produktado kaj pro la vivkondiĉoj respondantaj al ĝi.

La regado de la proletaro malaperigos ilin ankoraŭ pli. Unuigitaj agadoj, almenaŭ flanke de la civilizitaj landoj, estas unu el la plej gravaj kondiĉoj de ĝia emancipiĝo.

Same tiom, kiom estas forigita la ekspluatado de unu individuo per alia, same tiom finiĝos la ekspluatado de unu nacio per alia.

Lige al la malapero de klasaj antagonismoj interne de la nacio malaperos la malamikeco inter la nacioj.

La akuzoj kontraŭ la komunismo, levitaj el religiaj, filozofiaj kaj ĝenerale ideologiaj vidpunktoj, ne meritas detalan pritrakton.

Ĉu necesas profundaj ekkonoj por kompreni, ke la konceptoj, opinioj kaj nocioj de la homoj, unuvorte, ilia konscio, ŝanĝiĝas kun iliaj sociaj rilatoj, ilia socia vivo?

Kion alian pruvas la historio de ideoj ol tion, ke la intelekta

produktado transformiĝas kune kun la materia? La regantaj ideoj de epoko ĉiam estis nur la ideoj de la reganta klaso.

Parolante pri ideoj, kiuj revoluciigas tutan socion, oni nur esprimas la fakton, ke interne de la malnova socio kreiĝis la elementoj de nova, ke al la disfalo de la malnovaj vivkondiĉoj paralelas sampaŝe la disfalo de la malnovaj ideoj.

Kiam la antikva mondo estis pereanta, la antikvajn religiojn venkis la kristanismo. Kiam la kristanismaj ideoj dum la 18-a jarcento estis venkitaj de la ideoj de la racionalismo, la feŭda socio batalis agonie kontraŭ la siatempe revolucia burĝaro. La ideoj pri libereco de pensado kaj religio nur esprimis la regadon de la libera konkurenco sur la kampo de scioj.

”Kompreneble”, oni diros, — ”religiaj, moralaj, filozofiaj, politikaj, prijuraj ideoj k.s. ja modifiĝis dum la paso de la historia evoluo. Sed religio, moralo, filozofio, politiko, juro daŭre postvivis tiun ŝanĝon.

Krom tio ekzistas eternaj veroj, kiel libereco, justeco ktp, kiuj komunas al ĉiuj sociaj statoj. Sed la komunismo forigos tiujn eternajn verojn, ĝi forigos la religion, la moralon, anstataŭ renovigi ilin. La komunismo do agas kontraŭ ĉiuj ĝisnunaj historiaj spertoj”.

Al kio redukteblas ĉi tiu akuzo? La historio de la tuta ĝisnuna socio moviĝas inter klasaj antagonismoj, dum la diversaj epokoj diverse formitaj.

Kian ajn formon ili havis, la ekspluatado de unu parto de la socio fare de la alia estas komuna fakto al ĉiuj pasintaj jarcentoj. Pro tio estas neniu miraklo, ke la socia konscio de ĉiuj jarcentoj, spite al ĉiu multeco kaj diverseco, moviĝis en certaj komunaj formoj aŭ ĝeneralaj ideoj, kiuj plene dissolviĝos nur kun la kompleta malapero de la klasaj antagonismoj.

La komunista revolucio estas la plej radikala rompo kun la tradiciaj proprieto-rilatoj, ne mirinde, ke ĝia evoluo inkludas plej radikalan rompon kun la tradiciaj ideoj.

Sed ni lasu la objetojn de la burĝaro kontraŭ la komunismo.

Ni jam supre vidis, ke la unua paŝo en la laborista revolucio estas la leviĝo de la proletaro al reganta klaso, la elbatalo de la demokratio.

La proletaro uzos sian politikan regadon por iom post iom eltiri el la burĝaro la tutan kapitalon, por centralizi ĉiujn produktado-instrumentojn en la manon de la ŝtato — tio signifas la proletaro, organizita kiel reganta klaso — kaj por multigi kiom eble rapide la produktado-fortojn.

Tio kompreneble povos okazi komence nur pere de despotaj intervenoj en la rajton je proprieto kaj en la burĝajn produktado-rilatojn, do pere de intervenoj, kiuj ŝajnas ekonomie nesufiĉaj kaj neteneblaj, sed kiuj dum la evoluo de la movado superos sin mem, fariĝantaj neeviteblaj kiel rimedoj de la revoluciigo de la tuta produktadomaniero.

Tiuj intervenoj nature estos malsamaj laŭ la diversaj landoj. Por la plej progresintaj landoj jenaj intervenoj estos aplikataj relative ĝenerale:

1. Senpropriigo de la tero kaj utiligo de la terento por ŝtataj elspezoj.

2. Imposto forte laŭgrada.

3. Forigo de la heredorajto.

4. Konfiskado de la proprietaĵo de ĉiuj elmigrintoj kaj ribeluloj.

5. Centralizo de la kredito en la manojn de la ŝtato pere de nacia banko kun ŝtata kapitalo kaj ekskluziva monopolo.

6. Centralizo de la transportaj aferoj en la manojn de la ŝtato.

7. Plimultigo de ŝtatproprietaj fabrikoj, de produktadoinstrumentoj, kultivado kaj plibonigado de la terposedaĵoj laŭ komuna plano.

8. Sama labordevo por ĉiuj, kreo de industriaj armeoj, aparte por la agrikulturo.

9. Kunigo de agrikulturo kun industrio, laŭgrada iom-post-ioma forigo de la diferenco inter urbo kaj vilaĝo.

10. Publika kaj senpaga edukado de ĉiuj infanoj. Forigo de la fabriklaboro de infanoj en la nuna formo. Kunligo de la edukado kun la materiala produktado ktp.

Se la klasaj diferencoj estos malaperintaj dum la paso de la evoluo, kaj se ĉiu produktado estos koncentrita en la manojn de la unuiĝintaj individuoj, la publika forto perdas la politikan karakteron. La politika forto en sia propra signifo estas la organizita forto de unu klaso por la subpremado de alia. Se en la batalo kontraŭ la burĝaro la proletaro necese unuiĝas kiel klaso, per revolucio, fariĝas reganta klaso kaj kiel reganta klaso perforte detruas la malnovajn produktado-cirkonstancojn, tiam ĝi detruas per tiuj produktado-cirkonstancoj la ekzisto-kondiĉojn de la klasa antagonismo, entute detruos la klasojn kaj tiel sian propran regadon kiel klaso.

Sur la loko de la malnova burĝa socio kun siaj klasoj kaj klasaj antagonismoj ni havos asocion, kie la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj.

III. Socialisma kaj komunisma literaturoj

1. LA REAKCIA SOCIALISMO

a) *La feŭda socialismo*

Laŭ sia historia pozicio la franca kaj la angla aristokratioj estis kompetentaj verki pamfletojn kontraŭ la moderna burĝa socio. En la franca Julia Revolucio de 1830 kaj en la angla reformmovado³⁷ ili denove estis venkitaj de la malamata parvenuo. Ne plu eblis paroli pri serioza politika batalo. Restis nur la batalo per rimedoj de la literaturo. Sed ankaŭ sur la kampo de la literaturo fariĝis neakcepteblaj la malnovaj paroloj de la restaŭra periodo³⁸. Por gajni simpatian, la aristokratio devis laŭŝajne malatenti siajn interesojn por povi formuli en la intereso de la ekspluatata laborista klaso sian akuzon kontraŭ la burĝaro. Tiel la aristokratio sin venĝis kantante mokkantojn pri sia nova reganto kaj frustrante en ties orelojn pli malpli katastrofajn profetaĵojn.

Tiel formiĝis la feŭdisma socialismo, duone plendkanto, duone pamfleto, duone eĥo pri la pasinteco, duone minaco de la estonteco, foje vundinte la koron de la burĝaro per amara, sprite detrua juĝo, ĉiam impresante komika pro la kompleta nekapableco kompreni la iron de la moderna historio.

37 Temas pri movado por reformoj de la balotrajto en Anglio. (*Trad.*)

38 Ne temas pri la angla restaŭra periodo de 1660 – 1689 sed pri la franca de 1814 – 1830. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

Por gajni por si la popolon, la aristokratio flirtigis kiel flagon la proletan almuzsakon. Sed kiom ajn la popolo sekvis la aristokration, ĝi ekvidis sur ties postaĵo la malnovajn feŭdajn blazonojn kaj diskuris ridaĉante laŭte kaj senrespekte.

Parto de la francaj legitimistoj³⁹ kaj la "Juna Anglio"⁴⁰ surscenigis tiun spektaklon.

Pruvante, ke ilia ekspluatmaniero estas alia ol tiu de la burĝoj, la feŭdistoj nur forgesas, ke ili ekspluatas sub tute aliaj kaj hodiaŭ antikviĝintaj cirkonstancoj kaj kondiĉoj. Montrante, ke dum ilia regado ne ekzistis la moderna proletaro, la feŭdistoj nur forgesas, ke ĝuste la moderna burĝaro estis neevitebla ido de ilia sociordo.

Cetere, ili tiom malmulte kaŝas la reakcian karakteron de sia kritiko, ke ilia ĉefa akuzo kontraŭ la burĝaro estas, ke sub ties reĝimo evoluas klaso, krevigonta la tutan malnovan sociordon.

Plie, ili riproĉas al la burĝaro ne tiom, ke ĝi kreas proletaron, sed ke ĝi kreas revolucionan proletaron.

En la politika praktiko pro tio ili partoprenas ĉiujn perfortojn kontraŭ la laborista klaso. Kaj en la ordinara vivo, spite al siaj bombastaj frazoj, ili klopodas pluki la orajn pomojn desur la arbo de la industrio, ŝakrante fidelecon, amon kaj honoron kontraŭ ŝaflano, furaĝbetoj kaj brando⁴¹.

39 Legitimistoj nomiĝis adeptoj de la dinastio de la Burbonoj, kiu regis en Francio de 1589 – 1793 kaj dum la restaŭra periodo de 1814 – 1830. (*Trad.*)

40 La grupo "Juna Anglio" fondiĝis komence de la 40-aj jaroj de la 19-a jarcento. En ĝi membris anglaj politikistoj kaj literaturistoj, kiuj apartenis al la Tory-partio. (*Trad.*)

41 Tio ĉefe koncernas Germanion, kie la kampara nobelaro kaj la junkraro proprakoste mastrumigas pere de siaj administrantoj

Kiel iris la pastro ĉiam man-en-mane kun la feŭdistoj, tiel faras la pastra socialismo kun la feŭda.

Nenio pli facila, ol doni socialisman koloron al la kristana asketismo. Ĉu ne ankaŭ la kristanismo agitis kontraŭ la privata proprieto, kontraŭ geedzeco, kontraŭ la ŝtato? Ĉu ĝi ne predikis, ke sur ties lokon venu bonfaremo kaj malriĉeco, celibato kaj voluptomortigo, vivo en monaĥ(in)ejo kaj eklezio? La kristana socialismo nur estas la sankta akvo, per kiu la pastro benas la ĉagrenon de la aristokratoj.

b) Etburĝa socialismo

La feŭda aristokratio ne estas la sola klaso, kiun detronigis la burĝaro, kies vivkondiĉoj degeneris kaj formortis en la moderna burĝa socio. La mezepoka palisburĝaro kaj la etkampanaro estis la antaŭuloj de la moderna burĝaro. En la industrie kaj komerce malpli evoluintaj landoj tiu klaso ankoraŭ plu vegetadas apud la leviĝanta burĝaro.

En la landoj, kie disvolviĝis moderna civilizacio, kreiĝis nova etburĝaro, ŝvebanta inter proletaro kaj burĝaro kaj daŭre rekreiĝanta kiel kompletiga parto de la burĝa socio. Sed ties membroj pro la konkurenco estas daŭre subenĵetataj al la proletaro. Pro la evoluo de la grandindustrio ili vidas alproksimiĝi momenton, kiam ili komplete malaperos kiel memstara parto de la moderna socio kaj en la komerco, ma-

grandan parton de siaj bienoj kaj samtempe ankaŭ estas grandproduktantoj de betsukero kaj terpoma brando. La pli riĉaj anglaj aristokratoj ankoraŭ ne tiom degeneris; sed ankaŭ ili scias, kiel egaligi la falon de la rento per la disponigo de sia nomo al pli malpli dubindaj fondintoj de akciaj societoj. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*)

nufakturoj kaj agrikulturo estos anstataŭigataj per laborkontrolistoj kaj servistoj.

En landoj kiel Francio, kie la kamparana klaso konstituas multe pli ol la duonon de la loĝantaro, estis nature, ke verkistoj, kiuj pledis por la proletaro kaj kontraŭ la burĝaro, kritikis la burĝaran reĝimon laŭ etburĝaj kaj etkampanaj kriterioj, tiel subtenante la starpunkton de la laboristoj laŭ la starpunkto de la etburĝaro. Do tiel kreiĝis la etburĝa socialismo. La ĉefrepresentanto de ĉi tiu literaturo, ne nur por Francio sed ankaŭ en Anglio, estas Sismondi⁴².

Tiu socialismo-skolo sekciis tre sagace la kontraŭdirojn en la modernaj produktado-kondiĉoj. Ĝi senmaskigis la hipokritajn apologiojn de la ekonomiistoj. Ĝi nekontesteble pruvis la detruajn efikojn de la maŝinaro kaj de la labordivido, la koncentradon de la kapitaloj kaj de la terproprieto, de la troproduktado kaj krizoj, la neeviteblan pereon de la etburĝoj kaj etkampanoj, la mizeron de la proletaro, la anarkion en la produktado, la kriaajn misproporciojn en la disdivido de la riĉaĵoj, la industriajn detrumiliton inter la nacioj, la dissolvigon de la malnovaj moroj, de la familiaj rilatoj, de la malnovaj naciecoj.

Laŭ sia pozitiva celo, tamen, tiu socialismo aŭ volas restarigi la malnovajn rimedojn de produktado kaj interesanĝo kaj per tio la malnovajn proprieto-rilatojn kaj la malnovan societon, aŭ ĝi volas perforte enŝlosi la modernajn rimedojn de produktado kaj interesanĝo en la kadron de la malnovaj proprieto-rilatoj, kiuj estis krevigitaj per tiuj rimedoj, devis esti

42 Jean Charles Léonard Simonde de Sismondi (1773 – 1842), svisa historiisto, ekonomikisto. (Trad.)

krevigitaj. En ambaŭ kazoj ĝi estas samtempe reakcia kaj utopieca.

Ĝiaj lastaj vortoj estas: gildaro en la manufakturo kaj patriarkaj rilatoj sur la kamparo.

Finfine tiu formo de socialismo dum sia plua evoluo malaperis en mizera nenieco.

c) La germana aŭ la "vera" socialismo

La socialisma kaj komunisma literaturoj de Francio, kiuj estiĝis sub la premo de reganta burĝaro, literatura esprimo de la batalo kontraŭ tiu regado, estis enkondukitaj en Germanion dum tempo, kiam la burĝaro ĵus komencis sian batalon kontraŭ la feŭda absolutismo.

Germanaj filozofoj, duonfilozofoj kaj belartemuloj avide ekkaptis tiun literaturon, nur forgesante, ke dum ĝia alveno el Francio ne venis samtempe al Germanio la francaj vivkondiĉoj. En la kontakto kun la germanaj cirkonstancoj la franca literaturo perdis ĉiun senpere praktikan signifon kaj alprenis pure literaturan aspekton. Ĝi devis aspekti kiel superflua spekulativo pri la realigo de la homa naturo. Tiel do por la germanaj filozofoj de la 18-a jarcento la postuloj de la unua franca revolucio nur estis postuloj de la "praktika prudento" en ĝenerala senco, kaj la volesprimoj de la revolucia franca burĝaro en ilia kompreno estis la leĝoj de la pura volo, de la volo, kia ĝi devas esti, de la vere homa volo.

La germanaj literaturistoj laboris sole por akordigi la novajn francajn ideojn kun sia malnova filozofia konscio aŭ, plue, alproprigi al si la francajn ideojn el sia propra filozofia vidpunkto.

Tiu alproprigo okazis same kiel oni entute alproprigas al si fremdan lingvon, nome per tradukado.

Estas konate, kiel monaĥoj skribis banalajn katolikajn historietojn pri sanktuloj sur manuskriptojn, sur kiuj estis skribitaj la klasikaj verkoj el la antikva pagana epoko. Rilate la profanan francan literaturon la germanaj literaturistoj invergis tiun procezon. Sian filozofian stultaĵon ili skribis sub la francan originalon. Ekz. sub la francan kritikon kontraŭ la ekonomia funkcio de la mono ili skribis "fremdiĝo de la humaneco", sub la francan kritikon kontraŭ la burĝa ŝtato ili skribis "neniigo de regado de la abstrakte ĝenerala", ktp.

La subŝovon de tiaj filozofiaj frazoj sub la francajn esprimojn ili baptis "filozofio de la ago", "vera socialismo", "germana scienco pri socialismo", "filozofia motivigo de la socialismo" ktp.

Tiel oni komplete kastris la socialisman-komunisman francan literaturon. Kaj ĉar en la mano de la germano ĝi ĉesis esprimi la batalon de unu klaso kontraŭ alia, la germano sentis la konscion, ke li superis la "francan unuflankecon", reprezentante la bezonon de la vero anstataŭ veraj bezonoj, la interesojn de la homa naturo kaj entute de la homo, anstataŭ la intereso de la proletaro, reprezentante la homon, apartenantan al neniu klaso, entute ne apartenantan al la realeco sed nur al la mistera nebulo de la filozofia fantazio.

Tiu ĉi germana socialismo, kiu prenis tiel serioze kaj solene siajn mallertajn lernejkababajn ekzercojn, distrumpetante ilin tiel reklamece, perdis dume iom post iom sian pedantan naivecon.

La batalo de la germana, aparte de la prusa burĝaro kon-

traŭ la feŭdistoj kaj la absoluta reĝismo, unuvorte la liberala movado, pliserioziĝis.

Tiel doniĝis al la "vera" socialismo la dezirita okazo, kontraŭmeti la socialistajn postulojn al la politika movado, ĵeti la tradiciajn anatemojn kontraŭ liberalismo, kontraŭ la reprezentantoj-ŝtatoj, kontraŭ burĝa konkurenco, burĝa gazetarlibereco, burĝa juro, burĝa libereco kaj egaleco, predikante al la popolamaso, ke nenion ĝi povus gajni ĉe ĉi tiu burĝa movado, sed kontraŭe, ĉion povos perdi. La germana socialismo ĝustatempe forgesis, ke la franca kritiko, kies sensprita eĥo ĝi estis, antaŭkondiĉas la modernan burĝan socion kun siaj konformaj materiaj vivkondiĉoj kaj konvena politika konstitucio, ĉio estis antaŭkondiĉoj, pri kies atingo oni ankoraŭ batalis en Germanio.

Al la germanaj absolutaj registaroj kun ilia postsekvantaro el pastroj, instuistoj, junkroj kaj burokratoj ĝi servis kiel bonvena birdotimigilo kontraŭ la minace leviĝanta burĝaro.

Ĝi fariĝis la dolĉeta deserto por la amaraj vipadoj kaj kugloj, per kiuj la samaj registaroj traktadis la germanajn laboristajn ribelojn.

Tiel fariĝinte armilo en la mano de la registaroj kontraŭ la germana burĝaro, la "vera" socialismo ankaŭ senpere reprezentis reakcian intereson, la intereson de la germana etburĝa filistraro. En Germanio la etburĝaro, devenante el la 16-a jarcento kaj ekde tiu tempo diversforme daŭre reaperanta, formis la veran socian bazon por la ekzistantaj cirkonstancoj.

Konservadi tiun klason signifas konservadi la ekzistantajn germanajn cirkonstancojn. De la industria kaj politika regadoj de la burĝaro la etburĝaro timas sian certan pereon, unuflanke pro la koncentrado de la kapitalo, aliflanke pro la ek-

estiĝo de revolucia proletaro. Al ĝi ŝajnis, ke la "vera" socialismo mortigos ambaŭ muŝojn per unu frapo. Ĝi disvastiĝis kiel epidemio.

La robo, teksita el spekulativa aranea ŝpinaĵo, brodita per belanimaj parolfloroj, saturita per amsufoka roso de sentimentaleco, tiu ekzaltita robo, en kiun la germanaj socialistoj envolvigis siajn kelkajn sekajn "eternajn verojn", nur kreskigis la vendon de sia varo ĉe tia publiko.

La germana socialismo siaflanke ĉiam pli komprenis, kiel sian destinon, esti la bombasta reprezentanto de tiu etburĝa filistraro.

Ĝi proklamis la germanan nacion modela nacio kaj la germanan filistran tipa homo. Al ĉiu ajn fiago de tiu modela homo ĝi donis kaŝitan, altan, socialisman signifon, ekzakte la kontraŭon de ĝia vera signifo. Ĝi tiris la lastajn konsekvencojn, pledante rekte kontraŭ la "krude detrua" direkto de la komunismo kaj deklarante sian nepartiecan superecon super ĉiuj klasbataloj. Kun tre malmultaj esceptoj ĉiuj laŭaserte socialismaj kaj komunismaj verkaĵoj, cirkulantaj en Germanio, apartenas al tiu kota, nervodetrua literaturo⁴³.

2. La konservativa aŭ burĝa socialismo

Parto de la burĝaro deziras forigi la socialajn mankojn por sekurigi la ekziston de la burĝa socio.

Al tio apartenas: ekonomiistoj, filantropoj, humanuloj, pli-

43 La revolucia ŝtormo de 1848 forbalais tiun tutan aĉan direkton, prenante de iliaj reprezentantoj la emon daŭrigi la socialismumadon. Ĉefa reprezentanto kaj klasika tipo de tiu direkto estas sinjoro Karl Grün*. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

* *Karl Grün* (1817 – 1887), etburĝa germana publicisto. (*Trad.*)

bonigantoj de la situacio de la laborantaj klasoj, organizantoj de bonfarado, kontraŭuloj de bestoturmentado, fanatikuloj por modereco, pseŭdoreformuloj de plej dubinda speco. Tiu burĝa socialismo ankaŭ estis disvolvita al kompletaj sistemoj.

Kiel ekzemplon ni mencias "Philosophie de la misère" de Proudhon.

La socialistaj burĝoj deziras la vivkondiĉojn de la moderna socio, sed sen bataloj kaj danĝeroj neeviteble rezultantaj el tiuj kondiĉoj. Ili deziras la ekzistantan socian staton sen la elementoj revoluciantaj kaj dissolvantaj ilin mem. Ili deziras la burĝaron sen la proletaro. Komprenoble la burĝaro imagas tiun mondon, en kiu ĝi regas, la plej bona mondo. La burĝa socialismo ellaboras tiun konsolan imagon al duona aŭ komplete sistema. Alvokante la proletaron realigi tiajn sistemojn kaj rekte marŝi en la Novan Jerusalemon⁴⁴, ĝi fakte nur postulas, ke la proletaro restu en la limoj de la nuna socio, sed forĵetu siajn malicajn imagojn pri la burĝaro.

Dua, malpli sistema kaj nur pli praktika formo de tiu socialismo klopodis malŝatigi al la laborista klaso ĉiun revolucion movadon, montrante, ke al ĝi utilis ne tiu aŭ alia politika ŝanĝo de la materialaj vivkondiĉoj, de la ekonomiaj kondiĉoj. Sub ŝanĝo de materialaj vivkondiĉoj tiu socialismo tamen tute ne komprenas la forigon de la burĝaj produktado-rilatoj, kio eblus nur per revolucio, sed celas administrajn plibonigojn, okazantajn sur la bazo de ĉi tiuj produktado-rilatoj, do nenion ŝanĝas ĉe la rilato inter kapitalo kaj dunga laboro, sed plejbonokaze por la burĝaro reduktas la kostojn de ĝia regado kaj plisimpligas ĝian ŝtatan buĝeton.

44 Metaforo por la ideala kristana socio de la estonto. (Trad.)

Sian adekvatan esprimon la burĝa socialismo atingas nur tie, kie ĝi fariĝas nura oratoraĵo.

Liberan komercon: por la avantaĝo de la laboranta klaso! Protektajn limimpostojn: por la avantaĝo de la laboranta klaso! Reformon de la prizonoj: por la avantaĝo de la laboranta klaso! Tio estas la lasta, la sola sincera vorto de la burĝa socialismo.

La socialismo de la burĝaro ja ĝuste resumeblas en la aserto: burĝoj estas burĝoj — por la avantaĝo de la laboranta klaso.

3. La kritike-utopiecaj socialismo kaj komunismo

Ni ne parolas ĉi tie pri tiu literaturo, kiu dum ĉiuj grandaj modernaj revolucioj esprimis la postulojn de la proletaro (kiel la verkoj de Babeuf⁴⁵ kaj aliaj).

La unuaj provoj de la proletaro rekte akceptigi sian propran klasan intereson, dum tempo de ĝenerala ekscitiĝo, dum periodo de la renverso de la feŭda socio, neeviteble fiaskis pro la subevoluinta stato de la proletaro kaj pro la manko de materialaj kondiĉoj de ĝia liberigo, kiuj ja nur estos la produkto de la burĝa epoko. La revolucia literaturo, akompananta la unuajn movojn de la proletaro, laŭ enhavo estas neeviteble reakcia. Ĝi instruas ĝeneralan asketismon kaj krudan socian samniveligon.

La propre tiel nomataj socialismaj kaj komunismaj sistemoj, la sistemoj de St. Simon, Fourier, Owen k. a., aperas dum

45 François Noel Babeuf, nomita Gracehus Babeuf (1760 – 1797), franca revolucia utopieca komunisto. Ekzekutita pro partopreno en ribelo por daŭrigi la francan revolucion. (*Trad.*)

la unua neevoluinta fazo de la batalo inter proletaro kaj burĝaro, kiun ni supre priskribis (Vidu ĉapitron I "Burĝaro kaj proletaro").

Kvankam la fondintoj de tiuj sistemoj vidas la klasajn antagonismojn, same kiel ankaŭ la efikon de la malligaj elementoj en la reganta socio mem, ili tamen ne vidas ĉe la proletaro historian iniciaton kaj memstaran politikan movadon.

Ĉar la evoluo de la klasa antagonismo sampaŝas kun la evoluo de la industrio, ili same ne vidas la materialajn kondiĉojn por la liberigo de la proletaro kaj serĉas socian sciencon, sociajn leĝojn, por krei tiujn kondiĉojn.

Socia agado devas cedi al ilia persona inventa agado. Historiaj kondiĉoj de liberigo cedas al fantaziaj kondiĉoj. Sur la lokon de iom post ioma organiziĝo de la proletaro al klaso ili metas aparte elpensitan organizon de la socio. La estonta monda historio reduktiĝas por ili al propagandado kaj praktika realigado de iliaj prisociaj planoj.

Ili ja konscias pri la neceso zorgi en siaj planoj ĉefe pri la interesoj de la laboranta klaso kiel pleje suferanta klaso. Por ili la proletaro nur ekzistas kiel la pleje suferanta klaso.

La neevoluinta formo de la klasbatalo same kiel iliaj propraj vivkondiĉoj faras, ke tiaj socialistoj kredas sin sendependaj de tiu klasa antagonismo. Ili volas plibonigi la vivkondiĉojn de ĉiuj membroj de la socio, ankaŭ de la plej bonstataj. Pro tio ili daŭre apelacias al la tuta socio, sen iu distingo, ja prefere al la reganta klaso. Oni ja nur devus kompreni ilian sistemon, por rekoni ĝin kiel la plej bonan planon de la plej bona socio.

Pro tio ili malakceptas ĉiujn politikajn, aparte ĉiujn revoluciajn agojn. Ili volas atingi sian celon per pacaj rimedoj,

klopodante malfermi vojojn al la nova socia evangelio per la forto de la ekzemplo per etaj, kompreneble fiaskantaj eksperimentoj.

Dum tempo, kiam la proletaro estas ankoraŭ ege neevoluinta, do mem ankoraŭ fantazie interpretas sian propran pozicion, tia fantazia priskribo de la estonta socio kongruas kun la unua antaŭsenta instinkto de tiu klaso pri ĝenerala rekonstruo de la socio.

Sed la socialismaj kaj komunismaj publikaĵoj ankaŭ enhavas kritikajn elementojn. Ili atakas ĉiujn principojn de la ekzistanta socio. Pro tio ili liveris plej valoran materialon por la klerigo de la laboristoj. Iliaj pozitivaj proponoj pri la estonta socio, ekz. pri la forigo de la kontraŭeco inter urbo kaj vilaĝo, de la familio, de la privata alproprigo, de la dunga laboro, la proklamo de la socia harmonio, la transformo de la ŝtato en nuran administracion de la produktado — ĉiuj ĉi proponoj nur esprimas la malaperon de la klasa antagonismo, kiu nur ĵus komencas evolui, kiu en tiuj publikaĵoj estas videbla nur en sia unua nedefinita formo. Pro tio tiuj proponoj ankoraŭ havas pure utopiecan karakteron.

La signifo de la kritike-utopieca socialismo kaj komunismo troviĝas en inversa rilato al la historia evoluo. Same kiom evoluas kaj elformiĝas la klasbatalo, same tiom tiu fantazia leviĝo super ĝi, tiu fantazia batalo kontraŭ ĝi perdas ĉiun praktikan valoron, ĉiujn teoriajn pravigojn. Kvankam la fondintoj de tiuj sistemoj estis multrilate revoluciaj, iliaj disĉiploj tamen ĉiufoje fondis reakciajn sektojn. Ili konservas la malnovajn konceptojn de la majstroj, ignorante la historian evoluon de la proletaro. Pro tio ili konsekvence klopodas malakrigi la klasbatalon kaj kompromisi inter la antagonismoj. Ili

ankoraŭ revas pri la eksperimenta realigo de siaj sociaj utopioj, fondo de unuopaj falansteroj, fondo de Hejm-Kolonioj, kreo de Malgranda Ikario⁴⁶, miniatura eldono de la Nova Jerusalemo, — kaj por konstrui tiujn aerkastelojn ili devas apelacii al la filantropio de la burĝaj koroj kaj monuoj.

Iom post iom ili sinkas en la kategorion de la supre priskribitaj reakciaj aŭ konservativaj socialistoj kaj distingiĝas de tiuj nur per ankoraŭ pli da sistema pedanteco, per fanatika superstiĉa kredo al la miraklaj efikoj de sia socia scienco.

Pro tio ili fantastike agas kontraŭ ĉiu politika movado de laboristoj, kiu, laŭ ili, povis ekestiĝi nur pro blinda ignoro de la nova evangelio.

La Owen-istoj en Anglio, la Fourier-istoj en Francio jen agas kontraŭ la ĉartistoj⁴⁷, jen kontraŭ la adeptoj de la reformistoj⁴⁸.

- 46 Falansteroj nomiĝis la socialistaj kolonioj planitaj de Charles Fourier. Cabet nomis sian utopion Ikario kaj tiel pli poste sian komunisman kolonion en Ameriko. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*) Home-Colonies (kolonioj enlandaj) Owen nomas siajn komunismajn modelsocietojn. Falansteroj estis la nomo de sociaj palacoj, planitaj de Fourier. Ikario nomiĝis la utopia lando de fantazio, kies komunismajn instituciojn priskribas Cabet. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)
- 47 Memstara politika movado de la angla proletaro meze de la 19-a jarcento ekde 1832 ĝis 1854. Nomata laŭ ĝia baza dokumento (People's Charter, popola ĉarto), la "unua laborista partio de nia tempo" (Engels). (*Trad.*)
- 48 La reformistoj, adeptoj de la pariza gazeto "La Reforme", agitis por starigo de respubliko kaj la apliko de demokratiaj kaj socialaj reformoj. (*Trad.*)

IV. Rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj

Post ĉapitro II kompreniĝas de si mem la rilato de la komunistoj al la jam konstituigintaj laboristaj partioj, sekve al la ĉartistoj en Anglio kaj al la agroreformistoj en Norda Ameriko.

La komunistoj batalas por realigi la senpere aktualajn celojn kaj interesojn de la laborista klaso, sed en sia aktuala movado ili samtempe reprezentas la estontecon de la movado. En Francio la komunistoj aliĝas al la socialista-demokratia partio⁴⁹ kontraŭ la konservativa kaj radikala burĝaro, ne re-

49 Temas pri la partio, kiu siatempe estis reprezentita en la parlamento de Ledru-Rollin*, en la literaturo de Louis Blanc** kaj en la taga gazetararo per la ĵurnalo "Reforme". La nomo "socialdemokratio" signifis ĉe ĝiaj inventintoj sekcio de la demokratia aŭ respublikana partio kun pli aŭ malpli da socialisma koloro. (*Noto de Engels al la angla eldono de 1888*).

La partio en Francio, siatempe nominta sin social-demokrata estis politike reprezentita per Ledru-Rollin kaj literature per Louis Blanc; ĝi do estis abisme malsama al la hodiaŭa germana socialdemokratio. (*Noto de Engels al la germana eldono de 1890*)

* Alexandre-Auguste Ledru-Rollin (Ledri-Rolen) (1807 – 1874), franca publicisto, unu el la ĉefoj de la demokrata etburĝaro, estis redaktoro de la ĵurnalo "La Reforme", en 1848 membro de la provizora registaro. (*Trad.*)

** Louis Blanc (Blan) (1811 – 1882), franca historiisto kaj etburĝa socialisto. (*Trad.*)

zignante la rajton rilati kritike al sensencaj frazoj kaj iluzioj, devenantaj el la revolucia tradicio.

En Svisio ili apogas la radikalulojn, ne forgesante, ke tiu partio konsistas el kontraŭdiraj elementoj, parte el demokrataj socialistoj laŭ la franca senco, parte el radikala burĝaro.

En Pollando la komunistoj apogas la partion por kiu la ag-rara revolucio estas kondiĉo de la nacia liberigo. Temas pri tiu sama partio, kiu iniciatis la Insurekcion de Krakovo en 1846⁵⁰.

En Germanio ĉiam kiam la burĝaro sekvas revolucion, la Komunista Partio batalas komune kun ĝi kontraŭ la absoluta monarkio, kontraŭ la feŭda terproprietulo kaj etburĝaro.

Sed eĉ por momento ĝi neniam ĉesas elformi ĉe la laboristoj kiom eble klaran konscion pri la malamika antagonismo inter burĝaro kaj proletaro, por ke la germanaj laboristoj tuj povu direkti kontraŭ la burĝaro kiel armilojn tiujn sociajn kaj politikajn kondiĉojn, kiujn neeviteble estigos la burĝaro per sia regado, por ke tuj povu komenciĝi la batalo kontraŭ la burĝaro mem post la faligo de la reakciaj klasoj en Germanio.

La komunistoj turnas sian ĉefan atenton al Germanio, ĉar Germanio troviĝas ĉe la antaŭkomenco de burĝa revolucio kaj ĉar ĝi realigas tiun revolucion sub plej progresintaj kondiĉoj de la eŭropa civilizacio entute, kaj kun multe pli evoluinta proletaro ol en Anglio en la 17-a kaj en Francio en la 18-a

50 Dum la nacia liberiga batalo en Pollando la ribeluloj sukcesis la 22-an de februaro 1846 konstitui en Krakovo Nacian Asembleon. La ribelo en Krakovo estis komence de marto 1846 disbatita de aŭstraj, prusaj kaj rusaj trupoj. (Trad.)

jarcentoj. Pro tio la germana burĝa revolucio nur povas esti la senpera preludo al proletara revolucio.

Unuvorte, la komunistoj ĉie subtenas ĉiun ajn revolucionan movadon kontraŭ la ekzistantaj sociaj kaj politikaj cirkonstancoj.

En ĉiuj ĉi movadoj ili elstarigas la demandon pri la propio to kiel la bazan demandon de la movado, en kiu ajn pli aŭ malpli evoluinta formo aperis tiu demando.

Fine, la komunistoj laboras ĉie por la unuiĝo kaj interkompreniĝo de la demokrataj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj malŝatas kaŝi siajn konceptojn kaj intencojn. Ili malkaŝe deklaras, ke iliaj celoj povas esti atingitaj nur per perforta renverso de ĉiu ĝisnuna sociordo. Timtremu la regantaj klasoj pro komunista revolucio. La proletoj per ĝi povas perdi nenion, krom siaj ĉenoj. Ili povas gajni mondon.

Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!

Pri la Esperanta eldono de la "Komunista Manifesto"

I

La "Manifesto de la Komunista Partio" apartenas al la plej multe tradukitaj verkoj de la politika literaturo. "Nuntempe ĝi sendube estas la plej disvastigita, la plej internacia produkto de la tuta socialisma literaturo, la komuna programo de multaj milionoj da laboristoj ĉiulandaj de Siberio ĝis Kalifornio", skribis Engels jam en la jaro 1890.

Ĝi estas tradukita en pli ol 120 lingvojn. Aperis pli ol 1200 eldonoj.

Tiu ankaŭ hodiaŭ fascina malmultpaĝa dokumento de la komunismo, kiu "samvaloras kiel kompletaj volumoj" (Lenin), estis tradukita ankaŭ en Esperanton. Aperis du tradukoj kaj 6 eldonoj.

I. En la jaro 1908 en Ĉikago ĉe la eldonejo "Charles H. Kerr and Company" publikiĝis traduko de Arthur Baker: "Manifesto de la Komunista Partio de Karolo Marks kaj Frederiko Engels. El la Aŭtoritata Angla Traduko, Redaktita kaj Alnotita de Frederiko Engels. Tradukita Esperanten (de) Arturo Baker. Verkinto de "The American Esperanto Book". Redaktoro de "Amerika Esperantisto" ". La 65-paĝa libreto ankaŭ entenis la anglan tradukon de Samuel Moore kun antaŭparolo kaj notoj de Friedrich Engels.

En sia anglalingva antaŭparolo, karakterizante la tutmondiĝon de la batalo inter la organizita laboristaro kaj la posedantoj de la produktadorimedoj, Baker skribis: "En la dis-

volviĝo de tiu mondvasta batalo la internacia lingvo Esperanto devas ludi gravan rolon. Ĝuste kiel la telegrafoj, la fervojoj kaj la vaporŝipoj ebligas al la modernaj nacioj rapide decidi pri la rezulto de la milito inter la Rusa Kapitalo kaj la Japana Kapitalo, tiel Esperanto post multaj jaroj plirapidigos la rezulton de la lukto inter la Tuta Laboro kaj la Tuta Kapitalo”.

La Manifeston li nomis ”the fundamento of the great political and economic struggle”(la fundamento de la granda politika kaj ekonomia batalo).

La ideo de Baker, presi paralele al la Esperanta traduko la anglan version, estas tre bonvena, ĉar oni povas taksi la anglan tradukon de Moore kvazaŭ dua originalo, pro la fakto, ke Engels trarigardis, korektis kaj redaktis ĝin kaj pro tio sendube garantiis altgradan fidelecon al la de li kaj Marx verkita germana originalo.

Kiu estis Baker? Laŭ la Enciklopedio de Esperanto (L. Kökény/V. Bleier 1933, p. 37) Arthur Brooks Baker (Bejkr) estis usona prelegisto kaj ĵurnalisto, naskita en 1877. Li fondis la unuan Esperanto-gazeton en Usono (”La Amerika Esperantisto”) kaj verkis broŝurojn kaj lernolibrojn pri Esperanto, eldonitajn en grandaj eldonkvantoj.

2. La dua provo traduki la Manifeston estas de Emil Pfeffer. En la volumo ”Dokumentoj de Komunismo” (Leipzig: SAT 1923, 132 p.) aperis la 48-paĝa Manifesto. La aŭstro Pfeffer (naskita en 1891) publikigis beletrajn kaj sciencajn tradukojn, verkis lernilojn kaj redaktis kelkajn revuojn.

En la organo de ”Arbeiter-Esperanto-Bund für. das deutsche Sprachgebiet” (Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj), ”Der Arbeiter-Esperantist” (”La La-

borista Esperantisto” n-ro 11/12 1923, p. 58) ni trovas koncizan informon pri la libro el la plumo de la redaktoro Adolf Sproeck, kiu kritikis la tradukon de Pfeffer skribante, ke ”la stilo... tro multe respiegulas germanan stilon, kiu tute ne povas pretendi esti internacia”.

Tiu kritiko estas rimarkinda, ĉar Pfeffer starigis al si altan celon. En lia antaŭparolo ni legas: ”Alpaŝante al la esperantigo de la Komunista Manifesto la Tradukanto estis gvidata de la intenco, doni al la Esperantistaro tradukon, kiu pli fidele respiegulas la originalon ol la ĝis nun aperintaj tradukoj nacilingvaj. Kaj se malgraŭ la precizeco de la traduko la verko esperantigita surprizas per sia facila legebleco, tiu ĉi fakto estu konsiderata kiel plua pruvo de la mirinda taŭgeco de Esperanto por preciza redono de la scienca literaturo, kiel nova stimulo kaj firmigo por la Esperantistaj kamaradoj fervore daŭrigi sian gloran, nuntempe tiom urĝan laboron: enkonduki Esperanton en servon de l’ tutmonda socialismo”. (p. 5/6)

3. Aperis dua eldono en la jaro 1924, ankaŭ ĉe SAT.

4./5. De la unua eldono aperis post la milito du senŝanĝaj fotorepresoj en Tokio (eldonejo ”Nauka”, 1948 kaj 1949), el kiuj ni citis Pfeffer, kvankam la tradukinto ne estas menciita. Tio estas la tria kaj kvara eldonoj de Pfeffer.

6. Kvina eldono de la Manifesto en la traduko de Pfeffer, 56-paĝa broŝuro aperis en 1936 ĉe SAT (Parizo). Temas pri iom korektita represo de la unua. La korektoj koncernas i. a. anstataŭon de ”kaj” per ”k”, kutima mallongigo en SAT-rondoj, anstataŭon de la malnova ”proletario” per la pli moderna formo ”proleto”. Anstataŭ ”plejbejo” ni trovas ”plebano”

anstataŭ "feŭdala" "feŭda" k. a. Evidente la "Plena Vortaro de Esperanto", eldonita en 1930 de SAT, efikas normige.

Al tiu eldono estis aldonita foto de Marx (sed strange, ne de Engels). La antaŭparolo de Pfeffer mankas. Anstataŭ ĝi aperas antaŭparolo pri la signifo de la Komunista Manifesto, verkita de Lucien Laurat (Lora) (pseŭdonimoj L. Lora, L. Revo). Ne estas klare, ĉu Pfeffer mem korektis la tekston aŭ ĉu tion faris Laurat.

II

Ĉar neniu el la menciitaj Esperantaj eldonoj estas plu havebla, la iniciato de la eldonejo "Progreso" reeldoni la Manifeston en Esperanta traduko estas tre salutinda. Kompleta retraduko necesis, inter alie pro tio, ĉar Esperanto intertempe fariĝis pli ol 100-jara. Kompreneble, la lingvo de 1908, de 1923 aŭ de 1936 ne estas la sama kiel de 1990. Ĝi evoluis. La kreskanta kvanto de socipolitikaj tekstoj stabiligis la ĉi-rilatan leksikon. La stilo fajniĝis.

Kiam ni akceptis la taskon traduki la Manifeston, ni ne tute konsciis pri la malfacileco de la afero. La teksto laŭ enhavo estas komuna verko de Karl Marx kaj Friedrich Engels. La unuan skizon por la enhavo verŝajne liveris Engels. Sed la finan tekston verkis Marx mem. La lingvaĵo de Marx ne ĉiam estas facile komprenebla. Ĝenerale agnoskita fakto. La stilo de Engels estas pli facile komprenebla.

Ni konfesas, ke ofte ni havis malfacilaĵojn tuj kompreni la esencon de Marx'aj frazoj. Kiel, do, ni procedis, klopodante liveri la trian tradukon de la Manifesto?

1. Pri diversaj dubaj punktoj ni konsultis la germanan specialiston el GDR pri la Manifesto, d-ron Wolfgang Meiser, kiu preparas la eldonon de la klasika teksto por MEGA, tio estas "Marx-Engels-Gesamtausgabe" (la kompleta Verkaro de Marx-Engels), scienca eldono kun 42 planitaj volumoj, preparata de la instituto pri Marksismo-Leninismo ĉe Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio, kunlabore kun la Instituto pri Marksismo-Leninismo ĉe Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio.

2. Dum la tradukado mem ni tute ignoris la antaŭajn du Esperantajn versiojn. Nur post la pretigo de nia traduko ni iom komparis, kiel oni povas vidi en ĉi tiu eseo.

3. Gravegan helpon al ni donis la angla traduko (1888) de Samuel Moore (1830 – 1912) kaj la franca traduko (1885) de Laura Lafargue (1845 – 1911). Samuel Moore, kiel tradukinto de granda parto de la "Kapitalo" de Marx kaj amiko de Marx kaj Engels, estis bonege preparita por fari adekvatan tradukon. Laura Lafargue estis la filino de Marx. Ambaŭ eldonoj ankaŭ aperis ĉe la eldonejo "Progreso". Aparte la angla traduko tre helpis, ĉar kelkloke ĝi estas pli klara ol la germana originalo. Foje ĝi iom diverĝas de la originalo, jen ion aldonas, jen ion ellasas. Se tio estis en la intereso de la komprenebleco de la teksto, ni foje (kvankam tre malofte) sekvis la anglan tradukon.

Jen kelkaj ekzemploj:

a) En la unua alineo temas laŭ la germana originalo i.a. pri germanaj policistoj (deutsche Polizisten). En la angla traduko ni trovas "police spies" (policaj spionoj). Baker tradukis laŭ la angla versio. Pfeffer kaj ni restis ĉe la originalo.

b) En la teksto (ĉapitro "Burĝoj kaj proletoj") mankas en la

germana originalo indiko de landoj, sed ni trovas ilin en la angla traduko. Do laŭ tio la Esperanta traduko devus teksti: "Subpremita klaso dum la feŭdsinjora regado... jen sendependa urba respubliko (*kiel en Italio kaj Germanio*), jen tria impostodeva klaso de la monarkio (*kiel en Francio*) ..." Baker sekvas la anglan version, menciante la landojn, Pfeffer kaj ni ne mencias la landojn.

c) En la unua alineo de la II-a ĉapitro ni i. a. trovas la frazon, kiu tekstas en la germana originalo: "Sie stellen keine besonderen Prinzipien auf", ni trovas en la angla versio "They do not set up any sectarian principles of their own". Pro tio ni elektis la pli klaran solvon: "Ili starigas neniuajn sektecajn principojn...". Ankaŭ jam Baker profitas de la angla versio ("Ili ne starigas sektajn principojn...") sed ne Pfeffer ("Ili starigas neniajn specialajn principojn...").

d) En la sama ĉapitro aliloke temas pri la koncepto (imago) de la burĝaro, laŭ kiu la burĝaj produktadomanieroj kaj proprieto-kondiĉoj estas eternaj leĝoj. La germana originalo: "Die interessierte Vorstellung ...teilt ihr mit allen untergegangenen herrschenden Klassen". Pfeffer tradukis laŭvorte "La interesitan imagon ...vi dividas kun ĉiuj pereintaj regantaj klasoj". Tio ne donas klaran imagon, pri kio temas. La angla traduko estas mirinde klara: "The selfish misconception ... you share with every ruling class that has preceded you" ("La egoisman miskoncepton ...vi partoprenas kun ĉiu gvidanta klaso, kiu antaŭis vin"). Pro tio Baker, pli kompreneble ol Pfeffer, tradukis: "La egoista malkompreno..." Kaj ni elektis: "La egoisma koncepto ...tiun koncepton vi havas komuna kun ĉiuj aliaj malaperintaj regintaj klasoj".

e) Eĉ okazas foje, ke la angla traduko enhavas ideojn, kiuj

tute mankas en la germana originalo. Engels verŝajne aldonis tion laŭ la sciokresko, akirita post la apero de la germana eldono.

Jen ekzemplo. Fine de la II-a ĉapitro aperas 10 intervenoj (Maßregeln), kiuj estu aplikotaj post la venko de la proletara revolucio. La 9-a interveno tekstas laŭ la germana originalo: "Vereinigung des Betriebs von Ackerbau und Industrie, Hinwirken auf die allmähliche Beseitigung des Unterschieds von Stadt und Land" (Kunigo de agrikulturo kun industrio, laŭgrada iom-post-ioma forigo de la diferenco inter urbo kaj vilaĝo.). En la angla versio oni aldone mencias, per kiu maniero tiu kunigo okazu, nome "by a more equable distribution of the population over the country" (per pli egala distribuo de la loĝantaro tra lando). Baker tradukis "... per pli egala disloĝiĝo de la popolo tra la kamparo". Tamen, nek Pfeffer nek ni aldonis tiun ideon, mankantan en la germana originalo.

f) Sed ankaŭ okazas, ke en la angla traduko mankas frazo, kiu aperas en la germana originalo. En la subĉapitro "La germana aŭ la 'vera' socialismo" de la III-a ĉapitro, en la dua alineo pri la socialisma kaj komunisma francaj literaturoj, importitaj al Germanio, mankas jena frazo: "Ĝi (la importita literaturo — D. B.) devis aspekti kiel superflua spekulativo pri la realiĝo de la homa naturo".

Jen nur kelkaj problemoj, kiuj devenas el la tre stimula komparo kun la angla traduko, komparo, kiu tre helpis trovi espereble akcepteblajn ekvivalentojn.

III

Aperis diversaj aliaj problemoj, kiujn mi devis solvi. Jen kelkaj:

1. Jam la titolo estis neklara. Baker nomas sian tradukon "Manifesto de la Komunista Partio". La titolo de la traduko de Pfeffer estas "La Komunista Manifesto". Tiu diferenco unuavide ŝajnas nekomprenbla. Ja la germana originalo el la jaro 1848 portas la titolon "Manifest der Kommunistischen Partei". Kaj la angla traduko de 1888 nomiĝas "Manifesto of the Communist Party".

Fakte la diverslingvaj tradukoj de la Manifesto ankaŭ ne estas unuecaj.

Engels en leteroj al Marx ankaŭ ofte nomis ĝin Komunista Manifesto. En kelkaj lingvoj la titolo tradukiĝis "(La) Komunista Manifesto", ekz. pola traduko de 1882 "Manifest Komunistyczny". La germana eldono de 1890, por kiu Engels verkis antaŭparolon (vidu en ĉi tiu broŝuro), aperis kiel "Das Kommunistische Manifest" ("La Komunista Manifesto").

Do la du titoloj evidente estis paralele uzitaj. Fakte estas eĉ pli logike nomi la dokumenton nur "La Komunista Manifesto", ĉar ne ekzistis Komunista Partio sed nur la "Ligo de Komunistoj", kiam aperis la verko. Verŝajne pro la influo de Marx la unua germana originalo portis la konatan titolon. Tiun modelon, malgraŭ ŝanceliĝoj, sekvis tamen la plej multaj tradukoj, krom la menciitaj, ekz. la franca "Manifeste du Parti communiste", la hispana "Manifesto dei Partido Comunista", la itala "Il Manifesto dei Partito Comunista" kaj aliaj. Pro tio ni ankaŭ sekvis la germanan originalon.

2. Al la plej konataj frazoj de la Manifesto sendube apartenas la unua:

”Ein Gespenst geht um in Europa
das Gespenst des Kommunismus”.

Kaj jen problemo, kiel traduki la verbon de tiu frazo?

Tre nekontentiga estas la traduko de Pfeffer: ”Fantomo ĉirkaŭvagas en Eŭropo — ...” Kvankam la angla traduko estas sufiĉe klara ”a spectre is haunting Europe”, ankaŭ la solvo de Baker ne kontentigas: ”Fantomo vizitadas Eŭropon”.

Pro tio ŝajnis al ni preferinde uzi la jam iom konatan neologismon ”hanti” (angle haunt, france hanter) kun la ĝenerala signifo ”ofte vizitadi, persekuti, plagi”. Ĝuste tiun signifon laŭ PIV havas ”hanti” (p. 373): ”Vizitadi (se paroli pri fantomo): ~ata domo, kastelo, (figure) tiu sceno ~as lian memoron. Vidu: obsedi”.

3. Malsame al la germana, la angla kaj aliaj lingvoj en Esperanto ne nur eblas distingi *komunist'* kaj *komunism'* (*socialist'* kaj *socialism'*) sed ankaŭ regule formi la adjektivojn *komunista/komunisma* (*socialista/socialisma*). Tiun distingoeblecon oni foje povas uzi. Ĝenerale la partio estas ”komunista” aŭ ”socialista” ĉar temas pri partio de homoj, de komunistoj/socialistoj. Sed la alstrebataj sociordoj estas la komunisma aŭ la socialisma.

4. En la germana ni havas la fremdvortojn ”Proletarier” kaj ”Proletariat”. En Esperanto ”proleto/proletaro” (ankaŭ la pli malnovajn formojn ”proletario/proletariato”). De ambaŭ substantivoj en Esperanto eblas senprobleme derivi la adjektivojn ”proleta/proletara” sed en la germana nur ekzistas ”proletarisch” (proleta). Ofte en la teksto aperas la kombinoj ”proletarische Revolution”. Se oni volas substreki la klasan enha-

von, oni devus traduki "proletara revolucio" ĉar temas pri revolucio ne nur farita kaj subtenita de proletoj, sed ankaŭ de burĝaj intelektuloj, kiel ekzemple de Marx kaj Engels. Se oni tamen volas akcenti la ĉefajn agantojn de la revolucio, oni tradukas per "proleta revolucio". Do, depende de la celita senco, ni uzis ambaŭ formojn.

5. En la 3-a subĉapitro de la tria parto ni tradukis la titolon per "La kritike-utopiecaj socialismo kaj komunismo". Baker tradukis "Kritika-Utopia Socialismo kaj Komunismo" kaj Pfeffer formulis "La kritike-utopista socialismo kaj komunismo". Unue ŝajnas al ni necese apliki la pluralon ĉe la adjektivo, ĉar ĝi koncernas du substantivojn. Sed pli gravas la demando, ĉu elekti "utopia" "utopiista" aŭ "utopiisma" "utopieca"? Ĉar por Marx kaj Engels nek la socialismo nek la komunismo en si mem estis utopio, pro tio ni devas akcenti la utopiecon de la traktitaj sistemoj de St-Simon, Fourier, Owen k. s. Ankaŭ en la germana originalo ni ne trovas "utopisch" (utopia) sed ja "utopistisch" (utopiista). Do Baker ne pravus kaj Pfeffer sekvas la germanan formon. Ĉar malpli gravis, ke la menciitoj estis utopiistoj, kaj multe pli substrekendas la utopieco de iliaj proponitaj socisistemaj celoj, ni elektis la tradukon "utopieca" kio ŝajnas al ni pli konforma.

6. Alia iom komplika problemo estas la distingo inter "propraĵo", "posedaĵo" kaj "proprietajaĵo", fundamentaj nocioj por la marksismo. Laŭ PIV eblas, laŭ certaj kuntekstoj, uzi ilin sinonime. La germanan "Eigentum" kaj "Eigentumsverhältnisse" Pfeffer tradukis ĉiam per "propraĵo" kaj "propraĵrilatoj". Baker uzas "posedeco" "posedaĵo" "propreco" "proprecaj rilatoj" kaj "propraĵo". Por tiuj tradukoj ĉiam troviĝas nur la angla "property" aŭ "property relations". Ni distingis inter "proprie-

to”, ”proprieto-rilatoj” kaj ”proprietaĵo”. Ĉar por la verkintoj de la Manifesto ”Eigentum” unuavice estis ekonomia kategorio, ni volis akcenti ĝuste tiun socian klasan rilaton, kiun spegulas la ”proprieto”. Laŭ PIV (p. 877) ”proprieto” estas ”rajto plene uzadi, disponi kaj eĉ detruai aĵon, en la limoj de la ekzistantaj leĝoj”. Al la radiko ”propriet’ ” rilatas la fundamente grava nocio ”senproprietigi”. Se temis pri certa konkretiĝo de la ”proprieto” ni uzis ”proprietaĵo”.

7. Problemon ankaŭ prezentis la traduko de la germana ”Pfahlbürger”, laŭvorte ”palisburĝo” unuavice tute ne komprenebla esprimo. Marx ne nur ne klarigas tiun nocion, li ankaŭ uzas ĝin senaverte kun diversaj signifoj. Pro tio necesis klarigo en la noto. Pfeffer ne distingas ambaŭ signifojn. Ĉar Moore en sia angla versio tradukis ”Pfahlbürger” per ”chartered burghers”, ”Philistines” kaj ”petty bourgeois Philistine”, Baker trovis pli bonan solvon ol Pfeffer tradukante ”enrajtigataj burĝoj”, ”germanaj filistroj” kaj ”kapitaletulaj filistroj”. Tamen ni simple uzis la laŭvortan tradukon ”palisburĝaro” por unu signifo, kaj por la alia — ”germana etburĝa filistraro” kaj ”etburĝa filistraro”.

8. Aŭ kiel traduki la germanan ”Lumpenproletariat” laŭvorte ”ĉifonproletaro”?

Moore angligas tion per ”dangerous class” kaj L. Lafargue simple transprenas la germanan vorton en la francan: lumpenproletariat. En la hispana traduko ni trovas ”lumpenproletariado”.

Kvankam ankaŭ en Esperantaj tekstoj jam aperis ”lumpenproletoj” (vidu en ”Cent tridek tri tagoj. Historia skizo de la hungarlanda proletara revolucio”. Leipzig. EKRELO 1930, p. 138), ni tamen trovas la tradukon ”ĉifonproletaro” sufiĉe el-

vokiva same kiel Pfeffer. Baker, laŭ la neklara angla esprimo, tradukis per "danĝera klaso".

9. Kaj fine sufiĉe miskompreniga estas la originalteksta esprimo "Weibergemeinschaft" angle "community of women" laŭvorte "virinkomuneco" (tiel ankaŭ Pfeffer). Baker tradukis "komuneco je virinoj" kio estas iom pli klara. Tamen, nur la kunteksto klarigas, ke temas pri "Komuna posedo pri virinoj". Do, kial ne tiel traduki?

Jen nur kelkaj el la multaj problemoj, kiujn ni alfrontis. Eble ni ne ĉie trovis kontentigan solvon. Sed, ni konsolas nin, ke multaj tradukintoj en multaj lingvoj baraktis kun similaj aŭ kun aliaj malfacilaĵoj de tiu klasika teksto de la komunista mondmovado.

IV

Komparante specimenojn el ĉiuj tri Esperantaj versioj kun la germana originalo, la angla traduko kaj laŭ la ebleco, kun diversaj nacilingvaj tradukoj, la leganto eble malkovros pluajn nuancojn kaj tradukproblemojn. Ni invitas lin al tio prezentante al lia propra analizo kaj juĝo specimenon el la dua ĉapitro de la Manifesto:

germane (g)	Proletarier und Kommunisten
angle (a)	Proletarians and Communists
Baker (B)	Proletarioj kaj Komunistoj
Pfeffer (3 eld.,P)	Proletoj k Komunistoj
Blanke (Bl)	Proletoj kaj Komunistoj.

- g In welchem Verhältnis stehen die Kommunisten zu den
a In what relation do the Communists stand to the
B En kia rilato staras la komunistoj al la
P En kia rilato staras la komunistoj al la
Bl Kia estas la rilato de la komunistoj al la
g Proletariern überhaupt?
a proletarians as a whole?
B proletarioj kiel tuto?
P proletoj entute?
Bl proletoj kiel tuto?
- g Die Kommunisten sind keine besondere Partei
a The Communists do not form a separate party
B La komunistoj ne estas aparta partio
P La komunistoj estas nenia speciala partio
Bl La komunistoj ne estas aparta partio
g gegenüber den anderen Arbeiterparteien.
a opposed to other working-class parties.
B opozicianta aliajn laborklasajn partiojn.
P rilate al aliaj laboristaj partioj.
Bl kontraŭ la aliaj laboristaj partioj.
- g Sie haben keine von den Interessen
a They have no interests separate and apart
B Ili havas neniajn interesojn apartajn
P Ili havas neniajn de la interesoj
Bl Ili ne havas interesojn apartajn
g des ganzen Proletariats getrennten Interessen.
a from those of the proletariat as a whole.
B el tiuj de la tuta proletariato.
P de l'tuta proletaro apartajn interesojn.
Bl de la tuta proletaro.

g Sie stellen keine besonderen Prinzipien auf,
 a They do not set up any sectarian principles of their own
 B Ili ne starigas sektajn principojn siajn
 P Ili starigas neniajn specialajn principojn,
 Bl Ili starigas neniujn sektecajn principojn,
 g wonach sie die proletarische Bewegung modeln wollen.
 a by which to sharp and mould the proletarian move-
 ment.

B laŭ kiuj formi kaj modli la proletarian movadon.

P laŭ kiuj ili la proletan movadon volas formi.

Bl laŭ kiuj ili volas fasoni la proletan movadon.

g Die Kommunisten unterscheiden sich von

a The Communists are distinguished from

B La komunistoj estas distingataj el

P La komunistoj diferencas

Bl La komunistoj distingiĝas

g den übrigen proletarischen Parteien nur dadurch,

a the other working class parties by this only:

B la aliaj laborklasaj partioj nur per tiu ĉi:

P de la ceteraj proletaj partioj nur per tio,

Bl de la aliaj proletaj partioj nur per tio;

g daß sie einerseits in den verschiedenen nationalen

a In the national struggles of the proletarians

B En la naciaj bataladoj de la proletarioj

P ke unuflanke ili en la diversaj

Bl En la diversaj naciaj bataloj de la proletoj

g Kämpfen der Proletarier die gemeinsamen,

a of the different countries, they point out

B de diversaj landoj, ili elmontras kaj portas

P naciaj bataloj de l'proletoj akcentas la komunajn,

Bl ili elstarigas kaj respektigas la komunajn,
 g von der Nationalität unabhängigen Interessen
 a and bring to the front the common interests
 B al la fronto la komunajn interesojn
 P de la nacieco sendependajn, interesojn
 Bl interesojn
 g des gesamten Proletariats hervorheben und zur Geltung
 bringen,
 a of the entire proletariat, independently of an nationality.
 B de la tuta proletario, ne depende de ĉia nacieco.
 P de l'tuta proletaro k substrekas ilian signifon,
 Bl de la tuta proletaro, sendependajn de la nacieco.
 g andererseits dadurch, daß sie in den verschiedenen Ent-
 wicklungsstufen, welche
 a In the various stages of development which
 B En la diversaj gradoj de disvolviĝado tra
 P aliflanke per tio, ke ili en diversaj evoluaj ŝtupoj, kiujn
 Bl En la diversaj evoluŝtupoj, kiujn trapasas
 g der Kampf zwischen Proletariat und Bourgeoisie
 a the struggle of the working class against the
 B kiuj la batalado de la laborklaso kontraŭ la kapitalistaro
 P la batalo inter proletaro k burĝaro
 Bl la batalo inter proletaro kaj burĝaro,
 g durchläuft, stets das Interesse der Gesamtbewegung
 a bourgeoisie has to pass through, they always and
 everywhere
 B devegas pasi, ili ĉiam kaj ĉie reprezentas la interesojn
 P trakuras, reprezentas ĉiam la intereson de la tuta
 Bl ili ĉiam reprezentas la interesojn de la
 g vertreten. Die Kommunisten sind also praktisch

- a represent the interests of the movement as a whole.
The Communists, therefore, are on the
- B de la movado kiel unu tuto. La komunistoj tial estas,
unuflanke,
- P movado. La komunistoj estas do praktike la
- Bl tuta movado. Do la komunistoj praktike estas la
- g der entschiedenste, immer weitertreibende Teil
- a one hand, practically, the most advanced and resolute
section
- B praktike la plej antaŭa kaj decidema sekcio
- P plej decidita, ĉiam pluen puŝanta parto
- Bl plej energia, ĉiam antaŭenpuŝa parto
- g der Arbeiterparteien aller Länder; sie haben
- a of the working class parties of every country, that sec-
tion
- B el la laborklasaj partioj en ĉiu lando, tiu sekcio
- P de laboristaj partioj el ĉiuj landoj; ili superas
- Bl de la laborista klaso de ĉiuj landoj; ilia
- g theoretisch vor der übrigen Masse des Proletariats
- a which pushes forward an others; on the other hand,
theoretically, they have
- B kiu puŝas antaŭen ĉiujn aliajn; aliflanke, teorie, pli ol la
- P teorie la ceteran mason de proletaro per la kompreno
- Bl avantaĝo rilate la alian amason de la proletaro estas, ke
- g die Einsicht in die Bedingungen, den Gang und
- a over the great mass of the proletariat the advantage of
clearly.
- B granda masego de la proletariato ili posedas tiun ĉi hel-
pilon —
- P pri la kondiĉoj, la iro k la ĝeneralaj rezultoj

- Bl ili disponas ekkonojn pri la kondiĉoj, la marŝlinio kaj
g die allgemeinen Resultate der proletarischen Bewegung
voraus.
- a understanding the line of march, the conditions, and the
ultimate general results of the proletarian move ment.
- B ili klare komprenas la vojon de la marŝo, la kondiĉojn,
kaj la finajn ĝeneralajn rezultatojn de la proletaria mo-
vado.
- P de l'proleta movado.
- Bl la ĝeneralaj rezultoj de la proleta movado.

Berlin (GDR), aprilo 1989

Detlev Blanke

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-142-9